

Esperiencia
V-19034/1995

EL POPOLA 中國報

CINIO



8

1995

ISSN 0032-4361

- REMEMORO POR LA PACO
- ĈE LA FONTO DE HUIHE-RIVERO
- ĈU LA ĈINA LINGVO MALFACILA? (II)
- PACO EN MONDO



Abelo sur floro

Foto de DA WEI

INTER NI

Por ke la malluma historio ne ripetiĝu

Ĉi-jare la popoloj de la tuta mondo celebras la 50-an datrevenon de la finiĝo de la Dua Mondmilito. Ankaŭ la ĉina popolo okazigas diversajn aktivadojn, kiaj mitingo, ekspozicio kaj arta prezentado.

La Dua Mondmilito jam forpasis antaŭ duonjarcento. Kial oni ankoraŭ mencias la pasintaĵojn? Fakte, la ĉina po-

polo, kiu multe suferis en la milito, nature deziras elturniĝi el la milita ombro por ĉiam, tamen la milito kaŭzis al ili tiel profundan vundon, ke ili neniel povas elviŝi ĝin el sia kapo. Kompreneble, la granda venko de la kontraŭfaŝisma milito gajnita je alta kosto estos eterne domaĝinda kaj memorinda por la homaro. Estas

neimageble, se oni forgesas ĝin hodiaŭ kaj la malluma historio ripetiĝos morgaŭ.

El la sama motivo, en ĉi numero ni dediĉas la artikolon "Rememoro por la Paco" al niaj bonkoraj legantoj.

Antaŭe kelkaj artikoloj en nia revuo neeviteble tuŝis tiun malagrablan historion. Iuj el niaj legantoj, neklaraj pri tiu historio, deziras bone koni ĝin. Ni esperas, ke la artikolo helpos ilin tiuflanke.

La Red.

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Rememoro por la paco
- 8 Pioniroj de la ĉina aero- kaj kosmonaŭtika afero
- 10 *ORIGINALE VERKITAJ:*
Paco en mondo (Poemoj)
- 12 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
Li Sen kaj E-movado de Interna Mongolio
- 14 *SUR NIA LIBROBRETO:*
Ĉiu silabo aludoplenas
- 15 *POR KOMENCANTOJ:*
Cikonio kaj najtingalo
- 16 *ESP-NOVAĴOJ*
- 17 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 18 Memorinda loko
- 20 *REORDIGO DE HUAIHE-RIVERO:*
Ĉe la fonto de Huaihe-rivero
- 24 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*
Bombasto kaj honesto
- 25 50 *KORESPONDI DEZIRAS*
- 26 *FAMAJ URBOJ:*
Porcelana urbo Jingdezhen
- 28 Aktinidioj
- 29 *BELECO DE ĈINIO:*
Budha paradizo en la Oriento

32 *MULTNACIA ĈINIO:*


- Pri religia kredo de ĉinaj naciminoritatoj
- 35 Hejmloko de perloj en Ĉinio
- 37 Vestoj kaj la Malpermesita Urbo
- 38 *ĈINA KULTURO:*
Ĉu la ĉina lingvo malfacila? (II)
- 40 Sur la ruino de la primitiva vilaĝo Banpo
- 42 Vojaĝo sur Lancang-Mekongo
- 44 Kampano kaj lia aligatorejo
- 46 *POR VIA SANO:*
Masaĝo en la ĉiutaga vivo (VI)
- 47 Nova rimedo por kuraci encefalo- kaj kardio-vaskulan malsanon
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *GALERIO:*
"Fruktobranĉo kaj Birdeto"

SUR LA KOVRILO:
S-ro Zeng Shandong en skulptado el porcelano Foto de **Da Wei**
- 2 Abelo sur floro

SUR LA DORSKOVRILO:
Jiayuguan-pasejo, la okcidenta fino de la Granda Muro

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Leshan (p. 29)
- 2. Hepu (p. 34)
- 3. Xi'an (p. 40)
- 4. Xishuangbanna (p. 42)
- 5. Xinyang (p. 20)



95/2825/d

Rememoro por la

ANTAŬ 50 jaroj estis enskribita en la mondan historion brila paĝo — Triumfis la monda kontraŭfaŝisma milito! Triumfis la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio! En tiu brila momento ĉio en la mondo fariĝis negrava, nur la paco estis la plej sankta!

Hodiaŭ, kiam ni retrorigardas tiun historion kaj karmemoras niajn familianojn mortintajn en la milito, ni havas ardan deziron: Milito estu for de la homoj, ĉar la mondo bezonas pacon!

Kiel unu el la gravaj partoj de la monda kontraŭfaŝisma milito, la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo daŭris 14 jarojn. La suferoj kaj animvundoj kaŭzitaj de la agresantoj al la ĉina popolo estas neesprimeblaj per vortoj. Sed la brutalaj agoj de la agresantoj igis la ĉinan popolon, kiu amas ŝian patrolandon kaj pacon, batali unuanime kontraŭ la malamikoj. La animskuaj scenoj de sanga batalado kontraŭ la malamikoj, la kampanjoj forte atakantaj la malamikojn, la prikantindaj kaj ĝislarne emociaj heroaĵoj en defendo de la patrolando kaj la vizaĝoj de ĉiuj respektindaj kaj amindaj batalantoj restos ĉiam en la memoro de la ĉina popolo.

KANONADO ĈE LA PONTO LUGOU

Vesperiĝis. La ponto Lugou sin banis en la subiranta suno kaj aspektis aparte kvietaj. La ponto, konstruita en la jaro 1189, estas la plej malnova ŝtona ponto en Pekino. Fama itala vojaĝisto Marco Polo siatempe laŭdis, ke ĝi estas la plej bona kaj senegala ponto en la mondo. La sennombraj ŝtonaj leonoj sur la balustradoj de la ponto ĝuas grandan famon. Ili en malsamaj pozoj estas versimilaj. Kiam matenruĝo kovras la orienton kaj en la ĉielo ankoraŭ pendas brila luno, la ponto kvazaŭ flosas en la lunlumo kaj la leonoj sur la balustradoj glimas sub la luno. Tio ja estas “Matena Luno ĉe la Ponto Lugou”, unu el la 8 famaj pejzaĝoj de la malnova Pekino.


Sed tiu alloga pejzaĝo estis neatendite disrompita de pafiloj kaj kanonoj de la japanaj agresantoj en la 7-a de julio 1937.

Vespere de tiu tago japanaj trupoj faris tiel nomatan militan ekzercadon ĉe la ponto Lugou. Oficiroj kaj soldatoj de la ĉina 29-a Korpuso tiam garnizonis en la urbo Wanping, proksime al la ponto Lugou. Japanaj armeanoj pretekstis, ke en la milita ekzercado perdiĝis soldato nomata Ishiyama. Ili venis sub la urbomuregon kaj nepre volis eniri en la urbon por serĉi la “perdiĝinton”. La ĉinaj garnizonantoj rifuzis la maljustan postulon de la japanaj trupoj. Ĉi tiuj tuj ekkanonis kontraŭ la urbo kaj la ponto. La ĉinaj armeanoj devigite leviĝis por rezisto. Tio ja estas la Evento ĉe Lugou, kiu skuis Ĉinion kaj la mondon.

La evento markis, ke la japanaj agresantoj ĉiufanke invadis la ĉinan teritorion. La ĉina popolo komencis sangverŝan bataladon. Tiel eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio.

Fakte jam en 1931 la japanaj militaristoj komencis invadi Ĉinion. La 18-an de septembro tiujare Japanio, kiu longe avidis la vastan teron de nordorienta Ĉinio, senbride lanĉis agresan militon kaj okupis la tri nordorientajn provincojn de Ĉinio, kies areo estas preskaŭ trioble pli granda ol la tuta teritorio de Japanio. Ĝi perforte proklamis la fondiĝon de la tiel nomata “Manĉurio”, intencante apartigi por ĉiam la tri provincojn disde la ĉina teritorio kaj turni ilin en kolonion de Japanio. La falo de nordorienta Ĉinio incitis la decidemon de la ĉina popolo rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj. Sed la tiama ĉina registaro, kiu sin okupis pri enlanda kontraŭkomunista milito, praktikis la politikon de nerezisto al la fremdlandaj malamikoj. Tio finfine jetis la tri nordorientajn provincojn tretatajn de la japanaj agresantoj en abismon de suferoj.

Nelonge post la Evento ĉe Lugou, la japana mararmeo lanĉis atakon kontraŭ la plej granda ĉina urbo Ŝanhajo. Vizaĝe al la senĉesa provoko de la



La Memorhalo de Viktimoj de la Nankina Masakro far Japanaj Agresantoj

agresantoj kaj la kriza momento de falo de la tuta lando en kolonion de Japanio, la ĉina popolo ne povis sin kvietigi. La 14-an de aŭgusto, sub la patriota postulo de la tutlanda popolo, la ĉina registaro publikigis deklaron de memdefenda rezistmilito. La suferoplena ĉina popolo komencis batali por justeco kaj paco.

Kune kun la ĉiuflanka eksplodo de la Dua Mondmilito en septembro 1939, la koluzio inter la germanaj, italaj kaj japanaj faŝistoj kaj ilia celo dividi la mondon pli kaj pli malkovriĝis. Formiĝis la monda kontraŭfaŝista tendaro. La Kontraŭ-japana Rezistmilito de Ĉinio fariĝis ne nur preludo de la monda kontraŭfaŝisma milito, sed ankaŭ grava konsistiga parto de tiu milito.

MASAKRO EN NANKINO

Milito estas kruela. La 13-an de decembro 1937, post sia konkero de Nankino, la japanaj agresaj trupoj faris tie masakron daŭrantan 6 semajnojn. Hodiaŭ, kiam oni mencias tiujn korŝirajn tagojn, oni senescepte deziras, ke ĝi estu nur inkubsonĝo. Tamen ĝi estas fakto. Sur la ŝtona muro duone sub la tero de Nankino klare skribiĝas: Viktimoj — 300 000. Tiu cifero registris la nepardoneblan krimon de la japanaj agresantoj kontraŭ la ĉina popolo.

Japana armea raportisto Kokou Yukio skribis en sia libro “Atestaj Vortoj de Armea Raportisto en Agresado kontraŭ Ĉinio”, eldonita en 1982:

“En Nankino ĉie videblis rabado kaj perfortaĵo. Ĉe la komenco de la eniro en la urbon, ankoraŭ estis multaj konstruaĵoj, sed en la sekva tago la armeanoj komencis bruligon. La brulego detruis ĉiujn ĉefajn konstruaĵojn kaj la nombro de la kaptitoj superis 100 milojn... La trupoj demandis la armean stabon, kiel trakti tiujn kaptitojn. Venis respondo: trakti konvene. Tio signifas mortigi senhezite. Sekve la kaptitoj estis kondukita de japanaj soldatoj al Xia-guan ĉe bordo de Yangzi-rivero por senkapiĝi. Ili

staris en vicoj. Kiam la kaptitoj en la unua vico estis senkapigitaj, tiuj en la dua vico ĵetis la kadavrojn en la riveron kaj poste restaris en vico por esti senkapigitaj same. En la dua tago la japanaj soldatoj, laciĝintaj pro la senkapigo, ekuzis maŝinpafilojn. La kaptitoj kune saltis en la riveron, tamen neniu el ili sukcesis naĝi ĝis la kontraŭa bordo.”

Xia Shuqin, postvivanto de la Nankina Masakro, al japanaj maljunuloj, kiuj siatempe servis en armeo kaj invadis Nankinon, kaj al japanaj junuloj rakontis kun larmoj la malfeliĉon de sia familio kun 9 membroj: ŝia patro malfermis la pordon kaj estis pafmortigita de japana soldato; ŝiaj maljunaj kaj malfortaj geavoj falis ankaŭ en morton; ŝiaj patrino kaj du pliaĝaj fratinoj post barbara perfortado estis kruele mortigitaj; la bebo en la sino de la patrino estis ĵetmortigita; nur ŝi kaj ŝia 4-jara fratinetino sukcesis eskapi. Hodiaŭ sur ŝia dorso ankoraŭ klare videblas profunda cikatro kaŭzita de sabro. Ŝia sanga kaj larva rakontado skuis la japanojn. Sed hodiaŭ en Japanio ankoraŭ estas multaj homoj, kiuj ne konas kaj eĉ ne kredas, ke ilia lando iam faris tiel kruelan kaj malhumanan krimon kontraŭ la ĉinoj. Ili kredas la mensogon de iuj personoj de la japanaj armea kaj politika rondoj, ke ilia lando portas neniun respondecon por tiu agresa milito kontraŭ Ĉinio. Tamen la fakto estas elokventa. Matsui kaj Tani, japanaj komandantoj, kiuj gvidis la masakron en Nankino, ricevis indan punon post la milito.

LA ĈINA POPOLO ESTAS NESUBIGEBLA

Jam ekde la unua tago de la Kontraŭjapana Rezistmilito la ĉina popolo komprenis, ke ĝi alfrontas malamikojn tre ferocajn kaj fortajn. Pro tio pli ol 35 milionoj da ĉinoj oferis sian vivon. Ankaŭ ekde la unua tago de la milito la ĉina popolo komprenigis al la malamikoj, ke ĝi estas nesubigebla.

Post la Evento ĉe Lugou ĉiuj enlandaj fortoj de Ĉinio rapide kolektiĝis sub la standardo de unuanima rezisto kaj komuna alfronto al la nacia krizo.

Inter ili la Komunista Partio de Ĉinio kaj la de ĝi gvidataj Okavoja Armeo kaj Nova Kvara Armeo, la centra registaro de Kuomintango kaj ĝia armeo estis du ĉefaj fortoj de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

La 25-an de septembro 1937 la Okavoja Armeo en Shanxi levis la faman Kampanjon ĉe la Pasejo Pingxingguan kaj ekstermis pli ol 3 000 malamikojn de la divizio Itagaki, la plej elita japana divizio, kaj tiamaniere disrompis la diron, ke la japanaj trupoj estas nevenkeblaj. Tio multe levis la entuziasmon de la ĉina popolo por la rezistmilito. La sekva Kampanjo de Cent Regimentoj estis batalo en senprecedenca skalo lanĉita de la Okavoja Armeo en la postfronto de la malamikoj. En tiu kampanjo la armeanoj detruis preskaŭ ĉiujn ĉefajn fervojojn, ŝoseojn, pontojn kaj telekomunikajn instalaĵojn de la malamikoj en norda Ĉinio, precipe en Shanxi, kaj frakasis multajn fortikaĵojn de la japanaj trupoj, ke ĉi tiuj suferis senprecedence seriozan baton. Samtempe kun tio la Komunista Partio de Ĉinio ankaŭ aktive gvidis la armeon kaj la popolon en gerila milito kaj starigis bazlokojn unu post alia. Tio ege timigis la japanajn agresantojn, ke ili devis transloki grandan kvanton da soldatoj por batali kontraŭ la Okavoja Armeo kaj la gerilaj taĉmentoj. La postfrontaj batalkampoj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio retenis preskaŭ 60% de la japanaj agresaj trupoj kaj fariĝis ĉefa forto de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio.

La Kampanjo ĉe Tai'erzhuang estis la plej sukcesa kaj plej patosa kampanjo organizita de la ĉefaj trupoj de Kuomintango sur la fronta batalkampoj. Tai'erzhuang situas proksime de la urbo Xuzhou, la fervoja nodo en la nordo de Ĉinio. Post sia okupacio de Nankino la japanaj trupoj decidis kuniĝi en la norda strategie grava urbo Xuzhou kun celo memkomprenebla.

La kampanjo komenciĝis en marto 1938 kaj finiĝis en aprilo. Al la kampanjo la japana flanko metis 70-80 mil armeanojn, dum la ĉina flanko pli ol 400 mil armeanojn. Pro forta kanonado fare de la japanaj trupoj Tai'erzhuang plurfoje falis en la manojn de la agresantoj kaj la ĉinaj trupoj kelkfoje dronis en senelira situacio. En la intensa batalado la ĉinaj armeanoj ĵuris kunekzisti kun la batalkampoj. Ili aj braveco kaj heroismo forte tuŝis la popolon. La 4-an de aprilo 70% de la armeanoj de la ĉinaj ĉefaj regimentoj estis vunditaj aŭ mortigitaj. Tamen por doni surprizan atakon kontraŭ la japanaj trupoj, la komandantoj kaj soldatoj de la ĉinaj trupoj formis morto-defian taĉmenton, kiu senhezite kaj deci-

deme sturmis la malamikan batalkampojn. Iuj soldatoj per glavo luktis kontraŭ japanaj armeanoj. Paniko dumtempe regis en la japanaj trupoj. La 5-an de aprilo la ĉinaj garnizonaj trupoj en Tai'erzhuang kune kun la help-trupoj lanĉis fortan atakon ambaŭflanke kaj formis potencon ofensivon. La 6-an de aprilo la ĉinaj trupoj komencis ataki ĉiuflanke. La malfortigitaj japanaj agresaj trupoj estis tute frakasitaj. Rezulte kelkmil malamikoj forkuris kaj pli ol 10 mil estis ekstermitaj.

Per siaj rezistado kaj vivofero la ĉina popolo retenis la japanajn faŝistojn kaj tiamaniere ege reduktis la militan premon alfrontatan de Sovetunio, Britio, Usono kaj aliaj landoj en Azio. Ekzemple, en 1941, kiam eksplodis la milito inter Sovetunio kaj Germanio, Germanio petis Japanion profiti la ŝancon fari kune kun ĝi tenajlan atakon kontraŭ Sovetunio el la Malproksim-Oriento. Tamen Japanio ne povis eltiri siajn trupojn el la ĉina batalkampoj por lanĉi atakon al la nordo kaj devis forlasi tiun gravan ŝancon. Tiel Sovetunio sukcesis iom post iom eltiri el la Malproksim-Oriento pli ol 500 mil armeanojn, pli ol 5 000 kanonojn kaj pli ol 3 300 tankojn kaj sendis ilin al la okcidenta parto por rezisti kontraŭ la germanaj trupoj.

Post la eksplodo de la eŭropa milito la japana armeo profitante la ŝancon puŝiĝi suden, intencante okupi la lokojn regatajn de Britio, Francio kaj aliaj landoj ĉe Pacifiko, sed pro la vintra atako levita vaste de la ĉinaj trupoj, ĝia plano fine disŝaŭmiĝis. Vintre de 1941, kvankam Japanio finfine lanĉis la Pacifikan Militon, tamen la nombro de ĝiaj trupoj por sudeniro ne atingis 30% de tiuj por la invado en Ĉinio.

LA FINA VENKO

La Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio estas justa milito. Tial ĝi ricevis subtenojn de ĉiuj justec-

Batalantoj de la Okavoja Armeo ĉe la pasejo Pingxingguan



defendaj kaj pacamaj landoj kaj popoloj. Kaj plie, en la plej malfacila tempo de la ĉina popolo iuj internaciismaj batalantoj venis al Ĉinio, sin ĵetis en la ĉinan Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj eĉ oferis sian vivon.

Norman Bethune estis fama kanada kirurgo. En januaro 1938, malgraŭ longa vojaĝo li venis al la nordo de Ĉinio. Li alportis al la Okavojaj Armeo, al kiu mankis kuracistoj kaj medikamentoj, ne nur grandan kvanton da bonaj medikamentoj kaj avangardaj kuracaj aparatoj, sed ankaŭ internaciisman spiriton. Foje, kiam li estis operacianta vunditon, bombo eksplodis proksime de lia provizora operaciejo. Oni admonis, ke li tuj retiriĝu, sed li insistis por fini la operacion. Aliffoje iu grava vundito bezonis transfuzon, li senhezite etendis sian brakon, ke oni prenu lian sangon. Ruĝa sango guto post guto transfuziĝis en la vejnon de la vundito. Ĉiuj ĉeestantoj kortuŝiĝis ĝis larmoj, tamen li daŭre laboris, rezignante ripozi eĉ unu minuton. Estis ege bedaŭrinde, ke foje dum savado de iu vundito lia fingro infektiĝis. Pro tio li falis en malsanon kaj mortis, tamen lia merito estas vaste konata kaj laŭdata en Ĉinio.

La nomo de Verda Majo estas bone konata de esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj. Ŝi, japanino, edziniĝis al ĉina studento, venis kun la edzo al Ĉinio kaj partoprenis en la batalo kontraŭ sialandaj militaristoj. Kia kuraĝo! Pro sia konduto ŝi estis kontraŭata de siaj samlandanoj, sed ŝi ricevis fortajn subtenojn kaj helpojn de ĉinaj esperantistoj. Ŝi estis malforta, tamen firmvola. Ĉu en la tagoj de malfacila migrado, ĉu en la tagoj de malsano kaj malsato, ŝi neniam forlasis sian fidon batali por la paco. En sia artikolo sub la titolo "Amo kaj Malamo", ŝi skribis: "Mi amas Japanion, ĉar ĝi estas mia patrio, kie vivas miaj gapatroj, gefratoj, geparencoj kaj geamikoj... Sed nun mi volonte aliĝus al la ĉina armeo, se eble,

Japanaj agresantoj kapitulacantaj



ĉar ĝi batalas por liberigo de l' nacio..." Verda Majo forpasis la 10-an de januaro 1947 pro malsano, en la aĝo de nur 35 jaroj.

Kiam la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio iom post iom kuniĝis kun la Kontraŭfaŝisma Milito de Eŭropo kaj faris Ĉinion grava batalkampo de la monda kontraŭfaŝisma milito, Ĉinio ricevis diversajn subtenojn de pli kaj pli multaj landoj, inkluzive de Sovetunio, Usono kaj Britio. En aŭgusto 1941 kolonelo Claire Chennault venis al Ĉinio kun usona volontula aviadila taĉmento sub sia gvido. En 7 monatoj la taĉmento frakasis 297 malamikajn aviadilojn kaj pro tio gajnis la honoron "Fluganta Tigro". Poste la usona aerarmeo decideme malfermis la fluglinion "Ĝibo" super la Tibeta Altebenaĵo. Pro tio sume 458 usonaj aviadiloj perdiĝis kaj sume 1 579 aviadistoj kaj rilataj personoj oferis sian vivon aŭ perdiĝis. Sed dank' al la malfermo de tiu fluglinio, Ĉinio ricevis 65 tunojn da diversaj materialoj, kio ludis gravan rolon por disrompi la blokadon de la japanaj trupoj, regi la azian batalkampon kaj gajni la finan venkon de la kontraŭfaŝisma milito.

En la komenca periodo de la ĉina Kontraŭjapana Rezistmilito Sovetunio la unua etendis helpajn manojn al Ĉinio. De 1937 ĝis junio 1941 ĝi donis al Ĉinio grandan kvanton da militaj materialoj kaj krediton je 250 milionoj da usonaj dolaroj. Samtempe kun tio, ĝi sendis al Ĉinio 2 000 volontulo-aerarmeanojn por batali kontraŭ Japanio kaj trejnis por Ĉinio preskaŭ 10 mil militajn teknikistojn. Ĉio ĉi faris la ĉinan popolon neizolita ekde la komenco de la milito, ke ĝi havu pli da decidemo kaj forto por rezisti kontraŭ la agresantoj. Kiam la milito iris en ŝlosilan momenton por la fina venko, denove estis la Ruĝa Armeo de Sovetunio, kiu per 1.5 milionoj da armeanoj lanĉis ĝeneralan atakon kontraŭ la japanaj trupoj en la tri nordorientaj provincoj de Ĉinio, tiamaniere ĝisfunde frakasis la lastan defendan linion de la agresantoj, liberigis la tri provincojn kaj metis solidan bazon por la kompleta venko de la ĉina Kontraŭjapana Rezistmilito.

La 14-an de aŭgusto 1945 la japanaj trupoj deklaris senkondiĉan kapitulacon. Dank' al la subteno de la mondaj popoloj, la ĉina popolo finfine venkis la perversaĵon kaj gajnis la pacon. Kvankam jam pasis plenaj 50 jaroj, tamen dum tiuj 50 jaroj la ĉina popolo neniam forgesis tiujn personojn, kiuj siatempe helpis Ĉinion kaj eĉ oferis sian vivon por ĝi. La ĉina popolo ĉiam alte taksas tiun amikecon cementitan per sango kaj la pacon cementitan per vivo! ■



TAN TIAN:

Pioniroj de la ĉina aero- kaj kosmonaŭtika afero

S-ino Xu Peizhen en simula flugado

EN 1952 la nova Ĉinio starigis la Pekinan Aeronautikan Instituton (nun Pekina Aeronautika kaj Kosmonaŭtika Universitato) speciale por kulturi aero- kaj kosmonaŭtojn. Tiam el la 113 instruistoj de la instituto estis tri virinoj. Ili estis la unuaj ĉinaj virinoj, kiuj laboris en la aero- kaj kosmonaŭtika kampo.

S-ino Lu Shijia estis la unua hidromekanikistino de Ĉinio. Ŝi lernis en Germanio ĉe prof. Ludvichi Plant, mondfama hidromekanikisto kaj la patro de aviadilo-industrio de Germanio. Sed komence prof. Plant ne volis akcepti tiun 26-jaran studentinon. "Sinjoro profesoro, bonvolu fari la decidon post ekzameno," diris Lu kun plena memfido. La ekzamena rezulto tute surprizis lin. Pro ŝia elstara sukceso li akceptis esplorstudentinon unuafoje en sia vivo.

La laboratorio de la Instituto de Aerodinamiko depende de Gottingen-universitato de Ger-

manio estis fermita por Lu Shijia, sed tio ne malhelpis al ŝi teorie solvi komplikajn problemojn de hidromekaniko kaj ŝia konkludo tute akordis kun tiu akirita en la laboratorio. Kompreneble, tio estis laŭdata de la kolegoj en la instituto.

En 1942 Lu Shijia gajnis la doktorecon pri filozofio de Gottingen-universitato per sia disertaĵo kun la titolo "Suprenruliĝado de Kolona Aerfluo Koliziinta kun Vertikala Aerfluo". En 1946 ŝi revenis al Ĉinio kaj instruis en la aeronautika fakultato de Beiyang-universitato kaj Qinghua-universitato. En 1952 ŝi estis membro de la prepara komitato por starigi la instituton kaj eklaboris kiel direktorino de la instrua sekcio de aerodinamiko. Ŝi laboris sur la posteno ĝis sia morto en 1986.

En pli ol 30 jaroj prof. Lu kaj ŝiaj kolegoj donis lecionojn de hidraŭliko kaj teoria kaj praktika aerodinamikoj, starigis la unuan fakultaton de inĝenieria

aerodinamiko de Ĉinio kaj elkulturis pli ol milon da studentoj kaj esplor-studentoj.

En la 50-60-aj jaroj la Pekina Aeronautika Instituto sukcese elfaris la unuajn leĝeran pasaĝer-aviadilon, aersondan raketon, senpilotan aviadilon kaj misilan cel-aviadilon de Ĉinio. Por tio faris penadon ankaŭ la profesorinoj de la instituto.

Karesante la makulplenan tegaĵon de la aviadilo "Pekino n-ro 1" en la Pekina Aeronautika Eksponejo, profesorino Li Zhengneng emocie rememoris la pasintajn neforgeseblajn tagojn.

Tiam ŝi estis 22-jara, diplomito de la Pekina Aeronautika Instituto. Kaj la temo por diplomigo estis projekti la aviadilon "Pekino n-ro 1", la antaŭiranton de ĉinaj aviadiloj. Prof. Li diris, ke siatempe mil instruistoj kaj studentoj unanime penis por projekti kaj elfari la aviadilon "Pekino n-ro 1". 100 tagojn poste, ili sukcesis elfari la leĝeran aviadilon kun ok sidlokoj. Kaj ekde tiam s-ino Li estis nedi-

siĝebla de sia kariero.

En la pasintaj pli ol 30 jaroj ŝi ne nur partoprenis en projektado de plurtipaj aviadiloj de la Pekina Aeronautika Instituto kaj akumulis multajn instruajn kaj scienc-esplorajn spertojn, sed ankaŭ kune kun aliaj kreis fakajn verkojn pri aviadilo-projektado, publikigis altvalorajn scienc-esplorajn disertaĵojn kaj tiel donis fidindajn sciencajn bazojn por projektoj kaj fabriki ĉinajn aviadilojn.

La aviadilo "Pekino n-ro 1" estis muntita en la fabriko funkciigata de la universitato. Pri tio respondecis la 26-jara asistantino Xia Xuanruo. Poste, ŝi respondecis pri muntado de altituda kaj altrapida cel-aviadilo, senpilota aviadilo, ultraleĝera aviadilo Mifeng kaj aliaj aviadiloj.

Kun la solida teoria bazo kaj riĉaj spertoj ŝi havis grandan kreivon. En muntado de aviadilo ŝi liberigis sin el la kateĝo de la tradicia ĉina aviadilo-fabrikado, plene profitis de la projektaj karakterizaĵoj de aviadila strukturo kaj garantiis la interŝanĝon inter fuzelaĝo kaj planeoj kaj inter tiu kaj empeno, sen uzi subportilon por prilaborado. Tio ne nur ŝparigis grandan sumon da mono, sed ankaŭ mallongigis la produktan tempon.

Prof. Zhang Jin estas "kuracisto" de aviadiloj. Ŝi okupiĝas pri esplorado de motoraj funkcio kaj misfunkcio.

Motora estas la koro de aviadilo. La sekura flugado de aviadilo tute dependas de la motoro. Antaŭe, kiam la motoro misfunkciis dum flugado, la piloto forigis la misfunkcion post juĝado surbaze de siaj spertoj; se la piloto erare juĝus, povus okazi kraŝo.

Prof. Zhang Jin bone komprenis, ke ŝia laboro rilatas rekte al la vivo de pilotoj. Ŝi do gvidis siajn kolegojn fari sintezan esploron pri la motoro kaj aviadilo, uzis komputoran teknikon en la motora kontrolo, sukcese ellaboris komputorajn sistemojn por kon-

troli la stacion de aviadila motoro kaj antaŭvidi la misfunkcion. Dank' al tio, oni povas ĝustatempe forigi la misfunkcion kaj garanti la sekurecon de la flugado. Tiu tekniko jam aplikigis en ĉiuj grandaj aeronautikaj kompanioj de Ĉinio.

Esploristino Xu Peizhen de la inĝenieria fakultato de aŭtomata regado de multaj jaroj okupiĝas pri esplorado de simulaj trejnaj aviadiloj. Por tio estis bezonata granda sumo da mono, ekz., por importi el Usono grandan civilan simulan aviadilon necesis 70 milionoj da juanoj. Por ŝpari monon prof. Xu kaj ŝiaj kolegoj ne nur projektis kaj elfaris diversajn malsamtipajn simulajn aviadilojn, sed ankaŭ persone faris simulan flugadon. Laŭ regulo, oni devis dungi piloton por simula flugado, sed ŝi ne volis tion kaj anstataŭe fojefoje pilotadis. Ofte ŝi, 60-jara, tute ŝvitis post 1-2-hora simula flugado. Oni diris, ke ŝia sukceso venis el ŝia ŝvito.

Ili estis profesorinoj kaj samtempe patrinoj. Por atingi ian sukceson ili devis venki pli da malfaciloj ol la viroj.

Profesorino Lu Shijia kaj ŝiaj studentoj



Tion pruvis la sukceso de la 49-jara prof. Qiu Wanhua.

Antaŭ 20 jaroj ŝi estis ordinara mezlerneja instruistino kaj havis tri infanojn, sed ŝi prenis sur sin la ŝarĝon de la familio. Dank' al ŝia subteno, ŝia edzo sukcesis en ekzamenoj kaj fariĝis esplorstudento. Antaŭ ol ŝia edzo finis la studadon, ŝi eklernis en la Esplor-studenta Kolegio de la Pekina Aeronautika Instituto.

En la pasintaj dekelkaj jaroj ŝi gajnis tri premiojn de scienc-teknika progreso, publikigis pli ol 50 disertaĵojn, kompilis kaj tradukis 11 fakajn librojn. Krome, ŝi ankaŭ sendis siajn du filojn lerni en la Pekina Aeronautika kaj Kosmonautika Universitato.

Ŝia edzo diris, ke ŝi neniam guas ferion. Por laboro ŝi eĉ forĝas ĉion sian. Kaj estas kutimo por ŝi enlitiĝi en profunda nokto...

Nun la profesorinoj konsistigas 1/3 de la profesoroj de la universitato, ankaŭ la esplor-studentinoj — 1/3 de ĝiaj esplor-studentoj. Ili daŭre kontribuos por la ĉina aerokaj kosmonautika afero. ■

Okaze de la 50-a datreveno de la venko de la monda kontraŭfaŝisma batalo ni publikigas kvar poemojn originale verkitajn de usona samideano Dr. Julius Balbin kaj bulgara samideano Nikola Peev.

La Red.

Paco en mondo

MAKSIMILIAN KOLBE

de **JULIUS BALBIN**

*Kiam pola serĝento
estis kondamnita en Auschwitz
al la morto pro malsato,
en subtera bunkro,
Maksimilian Kolbe,
franciskana monaĥo,
oferis sin mem
anstataŭi la kondamniton,
kiu havis edzinon kaj infanojn.*

*La komandanto de l' koncentrejo
konsentis
kaj la franciskano
descendis al la malsatbunkro,
kie li konsolis
tri aliajn kondamnitajn.*

*Post dek tagoj
ĉiuj kvar ankoraŭ vivis.
Tiam germana kuracisto
alvenis kaj mortigis ilin
per injekto de karbolacido.*

*En 1982 Papo Johano Paulo
proklamis Patron Kolbe
sanktulo de l' Katolika Eklezio.*

*Milmitoj da prizonuloj
en koncentrejoj germanaj
simile mortis
en turmentoj de l' malsato.*

*Do almenaŭ por mi,
kvankam ne oficiale sanktigitaj,
ili ĉiuj por ĉiam
restos sanktuloj.*

ORYOKU MARU

de **JULIUS BALBIN**

*Por la militkaptitoj
inter ili usonanoj, nederlandanoj kaj
britoj
transportataj per la ŝipo
nomita Oryoku Maru
de Filipinoj al Japanio
la kondiĉoj estis inferaj.*

*Fermitaj sub la ferdeko
40 el 1 650 mortis
dum kvardek ok horoj.
Kun unu botelo da akvo por tridek
pluraj trinkis propran urinon,
dum aliaj tranĉis siajn korpojn
por per propra sango
satigi sian soifegon.*

*Kiam usona aviadilo
dronigis la ŝipon,
la japanoj mortpafis
centojn da naĝantaj kaptitoj
en la maro.
Nur 450 vivaj
atingis Japanion.*

Per tiu krimago

*la japanoj kunfratiĝis
kun siaj naziaj aliancanoj.*

PARAŜUTISTOJ de **JULIUS BALBĪN**

*El brita aviadilo milita
elsaltas tri paraŝutistoj
kaj surteriĝas en kampo
de alta greno.
Ili liberigas sin
el paraŝutoj de artefarita silko
kaj lasas ilin sur la kampo.
Iu farmisto trovas ilin poste
kaj donacos ilin
al sia surprizita edzino.*

*La paraŝutistoj ektrovas sin
sur la teritorio
okupita de malamikaj germanoj.
Baldaŭ okazos
sanga konfrontiĝo
de aŭdacaj britoj
kaj kruelaj okupantoj germanaj.*

*La heroismo de tiaj paraŝutistoj
kontribuos multe al la fina venko
de l' Aliancanoj.*

*Tiaj paraŝutistoj
kutime ne iĝadis militkaptitoj,
sed estis senkompatate mortpafataj
de l' germanaj malamikoj.*

*Ilia sinofera heroismo
neniam estos forgesita
de ĉiuj civilizitaj popoloj
minacitaj de l' germanaj barbaroj.*

PACO EN MONDO de **NIKOLA PEEV**

*Nigra teruro
ĉagrenon portis —
Monda lumturo*



S-ro Nikola Peev en 1949

Dimitrov mortis.*

*Ĝermas kaj ploras
popol bulgara —
Akre doloras
vundo homara!*

*Patro spirita —
Dimitrov nia
estis hardita
viro genia.*

*Ni perdis lian
morteman korpon,
tamen neniam —
la gvidan forton!*

*Per vorto fajra
plu li nin gvidos —
Denove karaj
ni kantos, ridos!*

*Sturmlaborante
en la brigadoj
ne laciĝante
en la agadoj.*

*Antaŭen fratoj
fidelaj liaj,
fratoj amataj
diversnaciaj:
al venko lasta —
venko tutmonda
sur tero vasta:
pacon en mondo!*

*Georgi Dimitrov (1882-1949) estis mondfama bulgara kontraŭfaŝisma batalanto.

MENCIANTE Li Sen, multaj scias, ke li estas esperantisto afabla kaj vivoplena. Kiel estro de la E-Asocio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, de multaj jaroj li diligente lernas, aplikas kaj propagandas Esperanton kaj per tio multe kontribuas por nia movado en tiu nacimalplimulta regiono de Ĉinio.

En 1923 Li Sen naskiĝis en Tianjin. Diplomiĝinte el universitato en 1948, li komencis labori en fervojaj departementoj de Tianjin kaj Taiyuan. Poste, li laboris kiel ĉefingenero de la Fervoja Buroo de Hohhot, la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. En 1987 li emeritiĝis.

En sia universitata lernado Li Sen aktive partoprenis en socia aktivado kaj nun li restas sama, kvankam pli-ol-70-jara.

Li Sen eklernis Esperanton en 1944, kiam li lernis en la Pekina Universitato. Foje, li trovis la libron "Esperanto" en la Ŝtata Biblioteko de Pekino kaj scivoleme foliumis ĝin. Tiamaniere li interesiĝis pri Esperanto kaj eklernis ĝin. En lernado li faris multajn notojn. Li Sen diris: "Mi bone memoras la okazintaĵojn antaŭ kvindek jaroj. Bedaŭrinde, mi perdis la notkajeron." Tiu travivaĵo semis la verdan semon en lia koro kaj kunligis lin kun Esperanto por la tuta vivo.

Komence de 1979, informiĝinte, ke en Hohhot funkcias Esperanta asocio, li do entuziasme partoprenis en E-movado.

Nelonge post kiam li membriĝis al la E-asocio, li estis elektita kiel ĝia estro. Sub lia gvido la asocio fondis la revuojn "Verda Step" kaj "Amiko de Esperanto", funkciigis Esperantan kurson, korespondan E-kurson kaj radian E-kurson. Tiel multe progresis la E-movado de la Interna Mongolio.

En la pasintaj dekelkaj jaroj la E-asocio okazigis E-kurson ĉ. 100-foje, en kiu lernis pli ol 4 000 homoj. Ĉiufoje, kiam komenciĝis la kurso, Li Sen prelegis sub la titolo "E-movado kaj ĝia evoluo", por ke la kursanoj bone konu Esperanton.

Li Sen kun siaj samideanoj venkis multajn malfacilaĵojn por eldoni la organon "Verda Step" kaj "Amiko de Esperanto". Kaj plie, ili eldonis elesperantigitajn librojn, kiaj "Rememoro pri Militfajro" kaj "Esperanta Disertaĵaro", en la nomo "Libraro de Verda Step". Li Sen kaj aliaj aktivuloj ofte verkis disertaĵojn pri E-movado de Ĉinio kaj lingvaĵo de Esperanto. Iuj disertaĵoj aperis en Esperantaj revuoj. La de ili farita televida programo "La Interna Mongolio en Progreso" gajnis la duagradan premion en la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en 1992.

Li Sen opinias, ke por evoluigi E-movadon necesas pligrandigi la influon de Esperanto en ĉiuj kampoj. Ekde 1982 li propagandis Esperanton inter la fervojistoj per raporto, oratorado kaj kurso. Januare de 1984, fondiĝis la E-Asocio de la Fervoja Buroo de Hohhot. En 1992 fondiĝis la Ĉina Fervojista E-Asocio kaj Li Sen estis elektita kiel ĝia prezidanto. Nun la asocio havas rilaton kun dekelkaj fervojistaj E-grupoj en la mondo kaj kontribuas multe por la progreso de la ĉina fervoja afero kaj la ĉina fervojista E-movado.

Kiel emerito, Li Sen estas okupata pri diversaj sociaj laboroj, tamen li dediĉas plejparton de sia tempo al Esperanto. Li ofte helpas la asocion per sia honorario.

Li Sen kaj aliaj esperantistoj nun kompilas "Esperanta Vortaro por Fervoja Fako" kaj "Evoluo kaj Nuna Stato de Ĉinaj Fervojoj". Krom tio, li ankaŭ gastigas aŭ helpas esperantisto-vizitantojn en- kaj eksterlandajn. ■



ĈINAJ E-ISTOJ

Li Sen kaj

Teksto kaj fotoj de HAN HONG

S-ro Li Sen (dekstre) kaj s-ro Wu Xunnan, ĉefredaktoro de EPC





S-ro Li Sen (meze) kaj s-ino Zorka ENIZAN dum la 72-a UK



S-ro Li Sen kaj lia nepo legas EPC.

E-movado de Interna Mongolio

Membroj de la Infana E-kurso sub la Ĉina Fervojistia E-Asocio en prezentado



Ĉiu silabo aludoplenas

de SABIRA STAHLBERG (Germanio)

Ĉinaj klasikaj poemoj ilustritaj. Div. aŭtoroj. Komp. Wang Yanbo, Ren Guang. El la ĉina trad. Laŭlum. Ilustraĵoj de Yang Yongqing. Dulingva. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1990, 63 p. 19 × 27 cm. 13,80 gld.

Jen kolekto da ĉinaj poemoj, ĉefe el Tang-dinastio (618-907). Temoj: romantiko, Tang-poezio kolektiĝas konfuca moralo, taoisma mistero kaj budhisma realo. Postajn poemojn karakterizas



rafinitaj temaro kaj tekniko, sekve ankaŭ iom perdita freŝeco.

Poemoj ĉinaj estas koncizaj kaj plenaj de ideasocioj. Ĉu entute eblas transdoni la koncizecon, la rimojn (kiuj baziĝas sur tono kaj silabfinaĵo), la pensadon, la fonon? Ĉu la Esperanto-versio de la poemoj eĉ iom trafas la “ĝustan” sencan?

Mi ne senreviĝis legante, nek tute konvinkiĝis, sed ja entuziasmiĝis. Kvankam la traduko palas kompare kun la originalo, kelkloke ĝi estas pli inventema kaj fleksebla ol la ŝablona ĉina. Sed en Esperanto mankas la kultura fono, la ideoj kaj aludoj kiuj trapenetras ĉiun karakteron en la ĉina. Necesus antaŭparolo, por klarigi la ĉefajn trajtojn kaj temojn de la poemoj. Tamen eblas ankaŭ nur ĝui la libron: la bildoj estas belegaj, humuraj, kaj bone ilustras la enhavon. La etaj klarigoj en la ĉina sufiĉe klaras — sed ili estas por ĉin(olog)oj.

Mi levas la ĉapelon por Laŭlum, kiu sukcesis plenumi la malfacilan taskon traduki kvin- aŭ sepsilaban version, kie ĉiu silabo plenas de aludoj, kaj troviĝas bela kaj flua Esperanto kun rimoj (eĉ kie la ĉina ne havas kaj ne bezonas). Neeviteble la traduko kelkloke iom pezas, sed ĝenerale la rezulto estas laŭdinda.

El *Esperanto*, n-ro 1, 1995

Cikonio kaj najtingalo

de LARISA KUZMENKO (Ruslando)

EN tiu tempo birdoj ne scipovis kanti.

Subite ili eksciis, ke en iu malproksima lando vivas maljuna saĝulo, kiu instruas muzikon. Tiam la birdoj sendis

cikonion kaj najtingalon al li.

La cikonio tre rapidis. Ĝi ege volis fariĝi la unua birdomuzikisto en la mondo. Ĝi tiel rapidis, ke ĝi enkuris en la domon de la saĝa homo sen frapi la pordon, sen saluti la mal-

junulon kaj plej laŭte kriis al li rekte en orelon:

— Hej! Maljunulo! Instruu min pri muziko!

Sed la saĝulo decidis komence instrui ĝin pri ĝentileco. Li kondukis la cikonion al la sojlo, frapis la pordon kaj diris:

— Necesas fari tiel.

— Kompreneble! — ĝojigis la cikonio. — Ĉu tio estas muziko? — kaj ĝi forflugis por mirigi la mondon per sia arto.

La malgranda najtingalo alflugis malpli frue. Ĝi timeme frapis la pordon, salutis la homon, pardonpetis pro maltrankvilo kaj diris, ke ĝi ege volas lerni muzikon.

Al la saĝulo plaĉis la afabla birdo. Kaj li instruis la najtingalon pri ĉio, kion li sciis.

De tiam la modesta najtingalo fariĝis la plej bona kantisto en la mondo.

Sed la strangulo cikonio nur scipovas bekfrapi kaj ankoraŭ fanfaroni kaj instrui aliajn birdojn:

— Hej, aŭskultu! Necesas fari tiel, tiel! Tio estas vera muziko! Se vi ne kredas, demandu la maljunan saĝulon!




ESP-NOVAĴOJ

● Memore al la 75-a datreveno de E-agado kaj la 40-a datreveno de popol-diplomatia agado de samideano Chu Tunan (1899-1994), la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, Ĉina E-Ligo kaj Pekina E-Asocio kune pretigis memorkoverton kaj okazigis en Pekino posttagmeze de la 3-a de majo ceremonion de ĝia premiero, kiun ĉeestis s-ro Qi Huaiyuan, prezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj; s-ro Chen Haosu, ĝia vicprezidanto; s-ro Chen Yuan, prezidanto de la Ĉina E-Ligo; s-ro Chai Zemin, vicprezidanto de la Societo “Amikoj de Esperanto”; prof. Chu Zehan, filo de Chu Tunan; k.a. S-ro Zou Guoxiang, ĝenerala sekretario de la Ĉina E-Ligo, prezidis la ceremonion. S-roj Chen Yuan, Chen Haosu kaj Chu Zehan parolis en la ceremonio. La memorkoverto aĉeteblas per 1 USD aŭ 2 IRK ĉe s-ro Wang Hanping, kies adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio

● En januaro kaj februaro 1995 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis poŝtmarkajn seriojn “Jaro de la Porco”, “Prujno en Jilin” kaj “Dinghu-monto”. En la tago de emisio de la novaj poŝtmarkoj la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis 3 stampilojn kun vortoj Esperantaj kaj ĉinlingvaj, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui.

● Post longa preparado la unuan volumon de VINILKOSMO-KOMPIL’ eldonas EUROKKA (Esperanto-Rok-Asocio) dank’ al kunlaboro kaj subteno de muzikgrupoj kaj SAT-Junulfako, UEA, FAME-Fondaĵo, Prima de Las Lengas (Printempo de la lingvoj, okcitana festivalo), TEJO kaj multaj individuoj. La unua volumo konsistas el 15 kantoj de 15 muzik-



Memorkoverto
omaĝe al s-ano
Chu Tunan

grupoj, ekde nun mendeblas por: KD (Kompakta Disko) 120 FRF, 39 NLG, 24 IRK; KS (Kasedo) 70 FRF, 23 NLG, 14 IRK. (Aldonu sendokostojn) Ankaŭ la dua volumo antaŭmendeblas ĉe: Vinilkosmo, p/a EUROKKA, Esperanto-Rok-Asocio, FR-31450 Donneville, Francio.

● De la 26-a de februaro ĝis la 9-a de marto 1995 okazis la Unua Internacia Himalaja Renkontiĝo en Nepalo, kune aranĝis ĝin Nepala Esperanto-Asocio (NEA) kaj Sierra Travel and Tours. Estas historia evento por NEA, ĉar tiu estas la unua internacia programo en Nepalo, kiu konsistis el konatiĝa vespero, vizitado al fama Budha Stupao, sanktejo kaj urboj, prelegoj kaj paroladoj, internacia vespero ktp. 42 personoj, inkluzive de 14 alilandanoj partoprenis la renkontiĝon.

(Bharat Ghimire)

● En Niŝ de Respubliko Serbio en Jugoslavio jam 39 jarojn laboras kolektive du asocioj: Esperanta Asocio Ĉele Kula kaj Fervojista Esperanta Asocio Mile Veliĉkoviĉ. Ili regule kunvenas ĉiusemajne kaj organizas kursojn por komencantoj. Februare de 1995, la radio, televido de Serbio-Beograd-2 prezentadis la laboron de e-istoj kaj societoj en Niŝ.

(Tomislav Mitroviĉ)

● De januaro 1995 la domo, kiu apartenis al la bopatro de Zamenhof, estas scenejo de granda Esperanto-aktiveco. Krom la organizado de la 31-a BET (Balta E-Tendaro), la redaktado de Litova Stelo kaj la marda kaj merkreda kunsidoj de la junulara kaj

kaŭnasa kluboj, ĉiusemajne kolektiĝas dekoj da homoj dum la posttagmezoj por lerni la lingvon en tri grupoj.

La 31-an de marto s-ro Povilas Jegorovas, prezidanto de LEA, enmanigis atestojn al 52 kursfinintoj. La lecionoj okazis laŭ Cseh-metodo, po 90 minutoj tage, de la 6/03 ĝis la 29/03. Gvidis ilin brazila Cseh-instruisto. La 3-an de aprilo gelernantoj de la bazaj kursoj partoprenis la konversacian kurson.

La kursanoj deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj kaj akcepti proponojn. Bv. adresi al Litova E-Asocio a/c Aristóphio Alves Filho, a.d. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio. Ankaŭ la instruisto deziras korespondi kun aliaj E-instruistoj por interŝanĝi ideojn pri instruado al junuloj kaj plenkreskuloj.

LEA bonvenigas Esperantaĵojn el la tuta mondo (librojn, gazetojn, kasedojn, ludilojn k.a.). Helpu la agadojn de LEA. Abonu kaj abonigu “Litova Stelo”. Abonprezo por 6 kajeroj estas 20 gld (inkluzivas sendkoston). Kolektoj de la jaroj 1991, 1992, 1993 kaj 1994 riceveblas kontraŭ nur po 12 gld.

La brazila Cseh-instruisto daŭre akceptas proponojn por instrui la lingvon ie ajn, precipe en Eŭropo. Por kontakti lin, skribu al la supra adreso. Post junio lian adreson havos Internacia E-Instituto, Den Hago, Nederlando.

DEZERTO-EKSPLUATADO

En la vastega dezerto de nordokcidenta Ĉinio aperas verdaĵoj kulturataj de enmigrintoj.

En 1987 la familio de kamparano Zhang Qingshan kaj aliaj 15 familioj de kamparanoj de Gansu-provinco transloĝiĝis en Yaozhanliao en la regiono okcidente de la Flava Rivero.

Tiam en la dezerta Yaozhanliao ofte venegis. Pro tio iuj enmigrintoj revenis al siaj antaŭaj montregionoj, sed Zhang Qingshan kaj liaj familianoj restis. Ili ekspluatis tie hektaron da virga tero por kulturi tritikon, maizon, beton kaj fabojn, kaj 1.3 hektarojn da virga tero por kulturi fruktarbojn. Krom tio, ili okupiĝis ankaŭ pri bredado de brutoj kaj kortobirdoj.

Kvar jarojn poste, li famiĝis pro sia riĉiĝo per diligenta laboro. Li enspezis pli ol 7 000 iuanojn ĉiujare kaj vendis al la ŝtato 20 000 kg da greno en tiuj kvar jaroj. Li donis bonan ekzemplon al aliaj enmigrintoj. Nun pli ol 7 000 enmigrintoj fiksloĝas en la loko kaj inter ili ĉ. 50 estis naskitaj en la loko.

La lokoj loĝataj de enmigrintoj plejparte estas dezertaj kiel Yaozhanliao. En iuj lokoj, nelonge post kiam kamparanoj semis, la semoj estis forblovitaj de vento. Denove semado, denove forblovado. La kamparanoj firme decidis bridi sabloventon. Ili multe plantis arbedojn kaj metis surkampe pajlobaraĵojn. De 1992 la tiea ekologia medio pliboniĝas kaj la grena produktokvanto kreskas jaro post jaro. Kaj novaj domoj aperis unu post alia inter verdaĵoj.

Nun pli ol 500 000 homoj enmigris el sekaj montregionoj de nordokcidenta Ĉinio en la regionon okcidente de la Flava Rivero kaj irigaciatajn regionojn ĉe la rivero. Multaj vilaĝoj de enmigrintoj fariĝis verdejoj kun pumpputo, kanalo, strato, lernejo, hospitalo kaj kampŝirma forsto. La enmigrintoj ekspluatis tie 67 000 hektarojn da virga tero kaj per tio multe kontribuis al la konstruado de nordokcidenta Ĉinio.

“ĈINAJ URBOJ” EN ALIAJ LANDOJ

En la pasintaj centoj da jaroj, en iuj okcidentaj landoj aperis loĝkvartaloj de ĉinoj, kiujn oni nomas “ĉinaj urboj”. Nun en tiuj landoj vidiĝas novaj “ĉinaj urboj”, malsamaj ol la antaŭaj. Ili karakteriziĝas per bona situo, grandioza skalo, scienca projektado, racia aranĝo de instalaĵoj, distingiga nacia koloro kaj mallonga daŭro de konstruado.

La “ĉina urbo” en Florido nomata “Bela Ĉinio” estas la plej granda turisma konstruaĵo investita de Ĉinio en Usono. En ĝi estas multaj miniaturaj pejzaĝoj de Ĉinio, tradiciaj ĉinaj metiartaĵoj kaj ĝueblas ankaŭ ĉinaj kantoj kaj dancoj.

En la lastaj jaroj la urbo Tianjin kaj brita korporacio kune investis 900 milionojn da usonaj dolaroj por konstrui en Londono “ĉinan urbon” kun muregoj similaj al tiuj de la Imperiestra Palaco en Pekino. La arkitekturo kaj dekoracio de la urbo portas ĉinan stilon.

En 1992 ĉina kompanio kaj ĉindevena franco kune investis kaj konstruis ĉe la kunfluejo de Sejno kaj Marno de Parizo “ĉinan urbon” kun plank-areo de 47 000 kvadrataj metroj. Ĝi kovras 120 000 kvadratajn metrojn.

Proksime al la Ruĝa Placo kaj Kremlo en Moskvo estas “ĉina urbo” en formo de duonluno. Ĉiutage ĝin vizitas multaj turistoj el okcidentaj landoj. Tie ili povas ĝui ĉinajn pladojn kaj aĉeti memoraĵojn.

Preskaŭ en ĉiu urbo de Kanado estas “ĉina urbo”, pligrandigita surbaze de la malnova aŭ nove konstruita. Kvankam malsamaj en strukturo kaj skalo, ĉiuj “ĉinaj urboj” en tiu lando elspiras etoson de ĉina vivmedio.

La “ĉina urbo” en Romo havis rudimentan formon jam en 1987. La lokanoj diris, ke ĝi estas la plej granda “ĉina urbo” en Eŭropo. Ĝi kovras 60 hektarojn, havas 18 movoplenajn stratojn kaj 300 000 loĝantojn.

En 1987 ankaŭ en Brisbano de Aŭstralio estis konstruita “ĉina urbo”. Ĝi plene spegulas dieto-kulturon kaj popolajn morojn de Ĉinio.



Ŝtonaj leonoj sur balustroj

Memorinda loko

Fotoj de LIU SIGONG kaj LI YUWEI


Super Yongding-rivero, je 15 km sudokcidente de Pekino, sidas granda multarka ŝtona ponto, konstruita antaŭ 800 jaroj. La ponto havas multajn balustrojn kun skulptitaj leonoj. Jen la fama ponto Lugou. 100 m oriente de ĝi estas malgranda urbo, kiu longas 640 m de oriente okcidenten kaj larĝas 320 m de sude norden. Tio estas urbeto Wanping fama pro la Evento de la 7-a de Julio.

La 7-an de julio 1937 tie eksplodis la mondfama Evento ĉe Lugou (pri detaloj legu la artikolon "Rememoro por la Paco" en ĉi numero). En la sekvanta tago la Komunista Partio de Ĉinio telegrafis al la tuta Ĉinio por alvoki la tutan nacion al rezistmilito. Sub la standardo de la nacia unuecfonto la ĉina popolo faris 8-jaran sangverŝan batalon kaj gajnis la finan venkon en la milito.


Por rememorigi pri la naciaj herooj viktimiĝintaj en la batalo kaj diskonigi la gloran historion de la ĉina popolo, la ĉina registaro konstruis en la urbeto la Memorhalon de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la Ĉina Popolo, kiu estis malfermita al la publiko jam en 1987.

La Memorhalo de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la Ĉina Popolo





La ponto Lugou



La riparita turo de
la urbo Wanping

La granda reliefo en la memorhalo



Ĉe la fonto de Huaihe-rivero

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de DA WEI

Huaihe-rivero fluas inter la Flava Rivero kaj Yangzi-rivero, plej grandaj riveroj de Ĉinio. Ĝi fontas el Tongbai-monto en la sudo de Henan-provinco, trafluas kvar provincojn Henan, Anhui, Jiangsu kaj Shandong, kaj enfluas en Yangzi-riveron kaj la Flavan Maron. Ĝi, longa je 1 000 km., estas unu el la sep plej grandaj riveroj de Ĉinio. Ĝia baseno areo 270 milojn da kvadrataj kilometroj, kie la loĝantaro nombras 144 milionojn kaj la agraro areo 13.3 milionojn da hektaroj.

Antaŭ la 12-a jarcento la rivero fluis rekte en la maron sen ajna baro. Sed de la 12-a jarcento la Flava Rivero ofte inundis kaj entrudiĝis en la riverujon de Huaihe, kio faris ĝin katastrofa rivero. Post fondiĝo de la nova popola respubliko, la ĉina registaro prenis Huaihe kiel la unuan riveron, kiu urĝe bezonis ampleksan reordigadon, kaj multe sukcesis en tio. Sub la direktado de la principo "akcenti kaj akvokonservon kaj drenadon", oni faris multe da konstruaĵoj, kaj tiuj ŝanĝis la riveron en akvoadministran sistemon kun inundoprevento, akvodrenado, irigaciado, akvoproduktado, navigacio kaj hidroelektrado en kombino.

Sed en la lastaj jaroj la industria disvolviĝo alportis al la rivero novan danĝeron — poluadon. Traktado de la poluado de la rivero fariĝis nova problemo zorgata de la tuta ĉina socio. De tiu ĉi numero ni felietone aperigos artikolojn pri kontraŭerozio, poluci-bridado de la rivero kaj koncernaj problemoj.

La Red.

EN la unuaj aprilaj tagoj, kiam spikiĝis tritiko kaj ore floris kolzo, mi venis de Pekino al Gumiao-vilaĝo norde de Tongbai-monto.


La vilaĝo estis ĉirkaŭita de verdaj montoj, kaj ekster la vilaĝo, apud la rivero, staris steleo kun la vorto "Riverfonto". Kutime oni prenas la fonton apud la steleo kiel komenciĝon de Huaihe-rivero. Sed la lokanoj diris al mi, ke la vera fonto troviĝas sur la supro de Taibai-monto 1 140 m, super la marnivelo. Tie estas templo, kaj la pilgrimantoj diris, ke apud la templo estas puto, kaj la akvo penetriĝis en teron kaj fariĝis la fonto de Huaihe. Post nelonga distanco la akvo fluas subteren kaj fine eliras el rokmuro plena de liano kaj musko. La rojo akceptis multe da fluetoj kaj atingis la vilaĝon. Iu klerigita kamparano en la vilaĝo diris al mi, ke post pluvego sur la rokmuro aperas impona falakvo disŝpruciganta per-

lajn akverojn.

En la sekvanta tago mi venis al Nanwan-akvokonservejo sur la Leona Rivero, la unua branĉo ĉe la supra parto de Huaihe-rivero.

La akvokonservejo konstruita antaŭ 40 jaroj povas enteni 1.63 miliardojn da kubmetroj da akvo. En la pasintaj 40 jaroj la akvokonservejo ludis gravan rolon en in-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE HUIIHE-RIVERO





Kiosko kun steleo ĉe la riverfonto



S-ro Lin Rongsheng rakontas, kiel kulturaj aktiniduloj.

undopreventado, irigaciado, elektroproduktado kaj fiŝbredado. Mi grimpis sur la akvobaraĵon kaj rigardis ĉirkaŭen. Mi vidis, ke ambaŭflanke de la akvokonservejo staras montoj en vicoj, similaj al penikosubportilo. Jen la montoj ricevis la nomon Penikosubportilo. En la akvokonservejo estas insuloj grandaj kaj malgrandaj similaj al litorino. Lokanoj diris, ke en la montoj sudokcidente de la akvokonservejo kreskas tre bonaj tearboj. Ĉinoj kredas, ke bona teo venas de alta monto. Tie pluvo estas ofta, nebulo densa, humideco granda, grundo fekunda, kaj tearboj povas bone kreski. Tie produktiĝas *maŭĝjan*-teo, unu el la 10 famaj te-specoj de Ĉinio.

Same kiel Yangzi-rivero kaj la Flava Rivero, Huaihe-rivero havas grandajn diferencojn de akvoniveloj inter la supra kaj malsupra partoj, tial erozio estis tre serioza. En la lastaj jaroj, pro rapida kreskado de loĝantaro kaj manko de riĉfontoj, la homoj senĉese detruis arbarojn por ekspluati virgan teron. “Ĉion postuli de la montoj”, tio ŝajne estis leĝo en la okuloj de la montanoj ĉe la supra parto de Huaihe-rivero. Sed lecionoj en la lastaj jaroj instruis ilin: la montoj ne rekompencos, se la homoj ne amike traktos ilin. Ekde la reformado kaj pordomalfermo, la montanoj pli atentis gardon de akvo kaj tero, laŭkon-

trakte prenis sur sin la reguligon de malgranda baseno kaj akiris sukcesojn.

En la norda antaŭurbo de Xinyang estas malgranda baseno de Jinniu-monto, kun areo de 33.23 kvadrataj kilometroj. Antaŭ 1975 ĝi estis ege malriĉa loko pro malbona kontraŭerozio. La montanoj apenaŭ povis sin vivteni, kaj la jara pokapa enspezo de la loĝantoj ĉe la montpiedo estis nur dekoj da juanoj.

Sed Jinniu-monto tute aliaspektis en la lastaj dekelke da jaroj. La monto estas kovrita de pinoj, abioj, cipresoj kaj kverkoj. Krome la montanoj kulturis ankaŭ persikon, abrikoton, granaton, kaŝtanan kaj aktinidion. La loka respondeculo s-ro Lin Rongsheng diris al mi, ke lia hejmloko estas tre proksima de Suzhou, kaj li intencis transloki ĝardenon de la hejmloko al la montaro. Nun sur Jinniu-monto estas ĝardenoj de ĉerizo, umeo, orkideo kaj envazaj pejzaĝoj. Ilin ofte vizitas turistoj.

Kiam mia aŭto ĉirkaŭiradis la 99 montopintojn de Jinniu, mi vidis belan scenon: facilaj trafikoj teraj kaj akvaj interligis ĉiujn vilaĝojn, teraskampojn, arbarojn, fiŝbasenojn kaj laktobovinejojn.

S-ro Lin diris, ke Jinniu-monto estas regata de “ĝardena ekonomio”. Mi trovis tion ĝusta. Ĉar la

loko estas ne nur ĝardenriĉa por distriĝo, sed ankaŭ bazo de multspecaj entreprenoj. Ĉiujare la loko liveras al la ŝtato 400 tunojn da legomoj, 125 tunojn da viando, 75 tunojn da akvoproduktaĵoj, dum tearboj sur la 73 hektaroj da kampoj donas ĉiujare al la kulturantoj pli ol 400 mil juanojn. La fiksa kapitalo de la malgranda baseno kreskis de 30 mil juanoj en 1975 al 30 milionoj da juanoj en 1994, dum la meznombra pokapa enspezo kreskis de dekoj da juanoj al 1 250 juanoj en la sama periodo.


En la pasintaj pli ol 40 jaroj la lokanoj faris vastan kontraŭerozion sur la 88 300 kvadrataj kilometroj da tero de Henan-provinco en Huaihe-baseno, kaj kvinono de ili jam estis reordigita. Por 925 400 homoj estis solvita la problemo de trinkakvo kaj estis plibonigita la akvokvalito en la altfluora regiono loĝata de 29 000 homoj. Antaŭe la supra baseno de Huaihe-rivero estis rigardata de la loĝantoj kiel la loko “inundata en somero kaj aŭtuno, alkale kovrita en vintro kaj printempo, ke la vegetaloj malfacile kreskis kaj la kamparanoj formigris por almozpetado”. Sed nun la loko jam fariĝis unu el la bazoj de greno, kotono, oledonaj vegetaloj kaj tabako de Ĉinio, kaj multaj gubernioj kaj urboj de la loko fariĝis riĉaj lokoj kun prosperaj agrikulturo, forstumado kaj aliaj produktadoj. ■



Jingshan-gorço de Huaihe-rivero


Foto de **ZHANG YOULIANG**

Familio ĉe la fonto de Huaihe-rivero





Kampoj ĉe Huaihe-rivero



Taipingding de Tongbai-monto, kie fontas Huaihe-rivero
Foto de **LI DEWU**



Bombasto kaj honesto

de HOU JUELIANG

SOMERE de la pasinta jaro mi laborvojaĝis al iu gubernio en la malsupra baseno de Yangzi-rivero. En la rezidejo mi telefonis al la gubernia oficejo por kontakti kun mia amiko. Neatendite, la telefono ne funkciis. Servisto informis min, ke la telefona lineo estas malkonektita de poŝtofocejo.

Mi estis konfuzita: pro kio la poŝtofocejo malkonektis la lineon? La servisto diris al mi, ke oni ne havas monon por pagi la koston.

Mi povis nur viziti la amikon en lia hejmo. Renkontiĝinte, mi demandis:

“Ĉu via oficejo, tiel granda, ne havas monon por la telefona pago?”

Li amare ridis, kun konsterniĝo. Post mia pridemando, li fine diris la kaŭzon: la financo de la oficejo antaŭe ne estis streĉa, sole en lia fako estis 4 telefonoj.

Poste la ĉefa gvidanto de la gubernio, por elstarigi sian kapablon en la administrado, ŝvelraportis la ekonomian enspezon de la gubernio kaj superdonis 5 milionojn da juanoj. La gubernio troviĝas en agrikultura regiono kaj ĝiaj financaj fontoj estas limigitaj. Por ĝi tiuj 5 milionoj da juanoj ne estis bagatelo. Sekve ĝi devis redukti oficejajn administrajn elspezojn, kelkfoje eĉ ne povis ĝustatempe pagi salajron al la oficistoj.

Simila fenomeno videblas ankaŭ en aliaj lokoj. Mia alia amiko laboras en iu optik-instrumenta fabriko de la urbo Chongqing. Foje ĉe renkontiĝo li rakontis al mi, ke ankaŭ lia fabrikestro siatempe kun ia persona celo troigis la produktovaloron kaj kaŭzis grandegan damaĝon al la fabriko. Sed la supera instanco mistaksis la laborkapablon de la fabrikestro kaj promociis lin al pli grava posteno. Estis malfeliĉe, ke antaŭ ol li iris al la nova posteno, la fabriko jam ne povis teni sin plu.

La kaŭzoj de tiuspeca bombasta fenomeno estas diversaj. Iuj lokaj gvidantoj faras bombaston ne por sia persona promocio, sed por neracia komparo kun najbaraj lokaj gvidantoj. Ili timas postiĝi post la aliaj.

En la provinco Henan en la malsupra baseno de la Flava Rivero estas la gubernio Anyang. En la lastaj jaroj tie la vilaĝaj entreprenoj disvolviĝis tre rapide, sekve la nombro de enoficiĝintoj grandiĝis kaj la vivo de la popoloj pliboniĝis. Vere la lokaj gvidantoj laboris sufiĉe sukcese. Fine de 1993, en raporto al la supera instanco pri la produktovaloron de la vilaĝaj entreprenoj de la tuta gubernio la guberniestro skribis relative veran ciferon: 4 miliardoj da juanoj. Sed poste li informiĝis, ke tiu de la najbara gubernio Linxian atingis 5 miliardojn da juanoj. Timante postiĝi, li ordonis la statistikan fakon fari

modifon. Sekve estiĝis nova cifero de la produktovaloron: 4.885 miliardoj da juanoj. Li pensis en si: kvankam tio ne superis la najbaran, tamen la diferenco estas ne tiel granda.

En Ĉinio ordinaraj popolanoj abomenas malverajn vortojn. En la lasta periodo de la 50-aj jaroj, en multaj lokoj aperis bombasta laborstilo pro malveraj vortoj. Ĝi kaŭzis grandegan malfeliĉon al la popoloj en la kamparo kaj urboj. Tio restas ankoraŭ freŝa en la memoro de homoj pli-ol-50-jaraj. De post tiam ĉiuj tra la lando pledis por diri verajn vortojn, fari praktikajn aferojn kaj esti honestaj. De la lastaj pli ol 10 jaroj, rapide disvolviĝas la ĉina ekonomio. Por stabila disvolvo kaj evito de bombasto, la ĉina registaro daŭre pledas por la laborstilo serĉi veron el faktoj kaj postulas, ke diversnivela kadroj ne troigu siajn atingojn kaj rezervu por si manovrospacon. Tamen en iuj lokoj la kadroj ne agis tiamaniere, sekve bombasta laborstilo aperis denove. Tio estas danĝera. Kiam la guberniestro de Anyang ŝvelraportis la produktovaloron, du lokaj kadroj skribis leteron al la supera instanco por malkovri lian eraron. Tio vekis grandan atenton de la supera instanco. Ĝi speciale sendis laborantojn por enketo. Rezulte la guberniestro estis punita per malaltiĝo de oficrango kaj aliaj koncernaj lokaj gvidantoj ricevis indan punon.

En la moderna socio, informo ludas pli kaj pli gravan rolon. La ŝtato, entrepreno kaj eĉ individuo senescepte postulas precizajn informojn. Cifera informo estas grava bazo por la ŝtato en ellaboro de politiko. Erara informo kondukas al erara politiko kaj kaŭzas al la ŝtato grandan maltrafon en la decido, la sekvo estas neimagebla. Antaŭ 10 jaroj Ĉinio jam publikigis Statistikan Leĝon kaj postulis, ke en statistikado oni devas sekvi la faktojn kaj doni precizan ciferon, ne raporti nur atingojn, nek kaŝi la veran staton. Sed iuj personoj kun diversaj

maljustaj celoj neglektis la Statistikan Leĝon kaj raportis la statistikan ciferon tute laŭ sia propra bezono. Tio vekis profundan malamon de la popolanoj. Por forigi bombastajn fenomenojn, la ŝtato postulas, ke statistikistoj plifortigu sian leĝsisteman koncepton kaj laboru severe laŭ la Statistika Leĝo, alie ili estos punataj pro neglekto de sia funkcio. Samtempe kun tio necesas disvolvi la rolon de amaskomunikiloj, publike malkovri bombastulojn kaj meti statistikan laboron sub la kontrolon de amaskomunikiloj kaj popolanoj. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

*Privataj entreprenistoj serĉas perantojn, kiuj bone parolas la hungaran aŭ slovakajn lingvojn. Adreso: Amika Rondo de E-istoj, ZS. Vizslay, 044 05 Janik 5, Slovakio.

*Fraŭlo Dong Shulin, 24-jara, dez. kor. kun f-ino de aliaj landoj pri ĉiuj temoj. Adr.: Zaozhuang Meikuang Caimeiwuqu, CN-277101 Zaozhuang, Shandong, Ĉinio

*Blova orkestro de la urbo Barnaulo, 50-persona kaj aliaj profesiaj artaj grupoj serĉas kontaktojn por komuna internacia laboro. Adr.: Nikolao Makovjeĵ, P.O. Kesto 2040, 656064 Barnaulo-64 Rusio.

*La ĵus lanĉita revuo "Generacio 2000 — Defendantoj de la Paco" dez. kor. pri ĉiuj temoj kun e-istoj tra la tuta mondo kaj ricevi materialojn kaj fotojn precipe de infanoj. Adr.: Av. Rudge, 630, Bom Retiro, 01134-901 Sao Paulo-SP, Brazilo.

*Telefonkartojn, ĉefe uzitajn, el la tuta mondo konstante serĉas kaj kolektas: Vláda HASALA, poŝtkesto 34, CZ-696 62 Stražnice, Ĉeĥio.

*Jürgen Kloker dez. kor. pri fotado, motor-biciklado kaj (eble pri) policaj aferoj. Adr.: Brunnenstrasse 13, 89250 Senden-Aufheim, Germanio.

*Feng Kuang, 33-j. viro, dez. kor. kun filatelistoj kaj e-istoj t.m. por amikiĝi kaj interŝanĝi filatelaĵojn pri la 43-a Tutmonda Tablotenisista Ĉampioneca Konkurso kaj pri Esperanto, paco, ekologio kaj poŝto. Adr.: Hui-an-li n-ro 1, 1-202, Tanggu-qu, CN-300450 Tianjin, Ĉinio.

Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Paŝoj al Pli Alta Ŝtupo


La libreto "Paŝoj al Pli Alta Ŝtupo" estas kompilita kaj eldonita laŭ la peto de esperantistoj prezentita en la 77-a UK en Vieno. Ĝi entenas 150 artikolojn pri konversacioj, fabloj, rakontoj kaj prozaĵoj. Multaj el la artikoloj estis publikigitaj en la rubriko "Por Komencantoj" de "El Popola Ĉinio". La artikoloj estas vicigitaj laŭ facileco, la vortfarado regula kaj la tekstoj enhavoriĉaj kaj interesaj. La libreto estas taŭga por komencantoj en ilia memlernado kaj ankaŭ povas esti uzata kiel helpa legaĵo por elementa Esperanta kurso.

Formato: 18.4 × 12 cm. 195 pĝ.

Prezo: 8.00 USD

Mendu ĉe : Distribua Fako de EPĈ

Libroservo de UEA
nia peranto en via lando



Porcelana urbo Jingdezhen


Teksto kaj fotoj de DA WEI

Sur strato de Jingdezhen






Artisto en porcelana skulptado



Tradicia farado de porcelanaĵo



Fakulo Qin Xilin (maldekstre) kaj liaj lernantoj



Instalaĵo importita el Germanio

China signifas en la angla lingvo Ĉinion kaj ankaŭ porcelanon. El tio vidiĝas, ke la okcidentanoj ekkonis Ĉinion pere de porcelano. La plej fama produkto de porcelanaĵoj estas Jingdezhen de Jiangxi-provinco, Ĉinio. La urbo kun areo de 5 247 kvadrataj kilometroj kaj 1.34 milionoj da loĝantoj havas 1 700-jaran historion de produktado de porcelanaĵoj.

La urbo ekportis la nunan nomon en la jaro 1004, kiam la porcelana industrio estis prospera kun multaj famaj ceramikaj bakuloj kaj eminentaj metiistoj el la tuta lando. Tiam la tieaj porcelanaĵoj estis blankaj kiel jado, brilaj kiel spegulo, maldikaj kiel papero kaj belsonaj ĉe frapetado. En la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911) la kortegoj starigis tie bakulojn, dank' al kio la porcelana arto de Jingdezhen atingis altan nivelon kaj ekĝuis grandan famon en la mondo.

En la lastaj 15 jaroj la porcelana industrio de Jingdezhen rapide disvolviĝis, kaj jam formiĝis kompleta porcelan-industria sistemo, inkl. de prospektado kaj ekspluato de kaolino, projektado, farado, vendado kaj scienca esplorado de porcelanaĵoj. La porcelanaĵoj de Jingdezhen bludesegnaj, koloraj, delikataj, maldikaj, glazuritaj kaj skulptitaj gajnis 26 internaciajn orajn premiojn.

La urbo estas vere porcelana mondo. Ĉie tie vidiĝas belaj porcelanaĵoj. Statistiko montras, ke tie nun funkcias 150 porcelanaĵ-farejoj, grandaj kaj malgrandaj, kie laboras ĉ. 100 000 laboristoj.

Aktinidioj



Aktinidioj

AKTINIDIOJ (*Actinidia chinensis*) apartenas al la grimpoplantoj. Iliaj fruktoj plejparte en ovala formo maturiĝas en oktobro. 56 el la 57 specoj de aktinidioj en la mondo kreskas en Ĉinio, kaj el ili la aktinidio Zhonghua, plej nutra, estas propra al Ĉinio. Ĉiuj specoj kulturataj en la mondo estas ĝiaj bastardoj.

Origine la aktinidioj Zhonghua kreskis en montvaloj de la malsupra kaj meza basenoj de Yangzi-rivero. Pri tio temis ĉinaj poemoj antaŭ 3 000 jaroj. Antaŭ 1 200 jaroj oni komencis kulturi ilin en Shaanxi-provinco. En Tang-dinastio (618-907) oni notis la aktinidion kiel drogoherbon en medicina libro.

La freŝa kaj bongusta aktinidio, riĉa je suko kaj karno, havas kuracan valoron. Ĝi entenas 17 aminajn acidojn, pektinon, tanacidon, citratan acidon, flavonan substancon, mikroelementojn kaj vitaminojn.

Esploro pruvis, ke tiuj nutraj substancoj povas altigi la aktivecon de SOD en la eritrocitoj de la organismo, prokrasti seniliĝon kaj rezisti kontraŭ estiĝo de tumor. Longtempa manĝado de aktinidioj malmultigas kvanton de triglicerino el kolesterino en la sango, malhelpas la estiĝon de nitrata amino, kuracas malsanojn kardiovaskulan, encefalovaskulan kaj nutrokanalan kaj helpas al kuracado de stomaka malsano, hepatito, uretra litiazo, lepro k.a.

Komence de la kuranta jc., Nov-Zelando importis el Ĉinio tiuspecajn aktinidiojn, pogrando produktis kaj vendis ilin en internacia merkato. Poste, ankaŭ aliaj landoj disvolvis la kulturadon. Nuntempe la totala aktinidi-kultura areo atingis

340 000 hektarojn en la mondo. La kulturado havas belan perspektivon.

Fine de la 70-aj jaroj Ĉinio komencis sintezan ekspluaton kaj esploron pri aktinidioj, inkl. de selektado, kulturado, konservado, prilaborado, pakado kaj transportado. Oni grandaree kulturis aktinidion en la provincoj Shaanxi, Henan, Hunan kaj Jiangxi. Farante la scienc-teknikan esplorado, oni starigis 670 hektarojn da scienc-teknikaj aktinidi-ĝardenoj en Zhouzhi, Meixian kaj aliaj ok gubernioj de Shaanxi-provinco, ekspluatigis 6 700 hektarojn da aktinidi-kulturaj bazoj kaj elkulturis la bonspecan aktinidion Qinmei, kies unuopa pezo superis 100 g., kaj la plej granda — 200 g. Dum la kreskado oni ne uzas insekticidon. Por teni la aktinidion freŝa kaj garantiĝi ĝian kvaliton oni konservas ĝin en fizika rimedo.

La freŝaj aktinidioj devas esti konservataj en apartaj kondiĉoj, por tio ĉiuj aktinidi-kulturejoj investis por konstrui grandan konservejon. Rezulte de tio, la sukera entenkvalito kaj malmoleco de konservataj aktinidioj restas senŝanĝaj. Delikate kolektante kaj entenejigante aktinidion laŭ la sciencaj metodoj, oni ŝirmas ilin kontraŭ ĉia difektiĝo. Dum la konservado oni severe regas la temperaturon, aerfluan kaj humidecon kaj malebligas ŝimiĝon. Dank' al tio, la fruktoj post kvarmonata konservado restas freŝaj kiel tiuj ĵus rikoltitaj.

Sekve de la progreso en aktinidi-kulturado, disvolviĝis prilaboraĵoj de aktinidioj, kiaj ladaktinidio, ratafio, konfitaĵo kaj trinkaĵo kun densigita suko.

Nun, ĉinaj aktinidioj jam vendiĝas eksterlande. ■

Budha paradizo en la Oriento

Teksto kaj fotoj de HAN HONG

LESHAN en la provinco Sichuan, Ĉinio, estas budha vilaĝo. La loko estas mondfama pro sia giganta sida budhostatuo pli ol 70 m alta. Poste oni trovis gigantan kuŝantan budhon formitan nature el montoj. Tio ne nur pliiĝis la misterecon al la budha vilaĝo, sed ankaŭ inspiris la Leshan-anojn: Kial oni ne invitas ĉiujn budhojn el aliaj lokoj de la mondo en Leshan? Nun la Orienta Budha Urbo el pli ol 3 000 budhaj statuoj jam naskiĝis.

Leshan-anoj opinias, ke Budho estas la Plejpotenca. Se la budhaj statuoj ne estas grandaj, ili ne povas vekti grandan respekton ĉe la rigardantoj. Jen pro kio oni faris grandan kuŝantan budhon 170 m longan. La kapo de la statuo estas 24 m longa kaj la piedoj ĉiu 10.2 m larĝa. Sur la kapo vidiĝas 115 hartuberoj, ĉiu kun diametro de unu metro. Oni diris, ke ĝi estas la plej granda kuŝanta budho en la mondo hodiaŭ. Estas mirinde, ke oni faris la budhan statuon tute laŭ la natura tereno de la montoj. La kapo de la budha statuo troviĝas sude, dum la piedoj norde, kaj en la meza parto estas verda flaŭro, simila al verda kasajo. La giganta budho kuŝas tuj ĉe la monto, aspektas kviete, tute ne influate de la monda bruo. Oni diris, ke ĝi bele montris la kvietan mienon de Ŝakjamunio ĉe lia forpaso.



Mil budhostatuoj en niĉoj

La famaj budhostatuoj de ĉiuj dinastioj de Ĉinio estis refaritaj de Leshan-anoj laŭ la sama aŭ duona dimensio de la originaloj. Tie nun vidiĝas la granda budho Losana kun diketa vizaĝo kaj larĝaj brovoj en Longmen-ŝtonkavernaro. Tie estas ankaŭ la granda budho kun kvieta mieno en ekstreme maldika vesto. Ĝia originalo estas en Mogao-ŝtonkavernaro. Tie estas ankaŭ la granda budho kun longaj oreloj, maldikaj lipoj kaj alta nazo, farita laŭ la budhostatuo de Yungang-ŝtonkavernaro. Tie estas ankaŭ bela kaj gracia budhostatuo de Maiji-ŝtonkavernaro. Krom la supre menciitaj superbaj budhostatuoj tie estas ankaŭ alispeca budhostatuo, kies originalo estas en Lingyin-templo sur la

Eratika Monto en la urbo Hangzhou, t.e. barelventra Majtrejo kun nudaj brusto kaj ventro. La gaja budho kun eterne malfermita buŝo rigardas la vizitantojn. La artistoj per troigo montris la elstaran ventron kaj larĝe malfermitan buŝon. Jen aperis antaŭ la turistoj la ĉiam gaja, malkaŝema kaj malpedanteca budho. Ĝi estas tre ridiga kaj ĉagrenoforiga.

La malnova Ĉinio suferis de militado en la longaj jaroj kaj pro tio multaj valoraj budhostatuoj estis forprenitaj de alilandanoj. La Leshan-anoj karmemoras ilin kaj reproduktis 36 budhostatuojn laŭ la historiaj materialoj. Iliaj originaloj estas en aliaj landoj. Nun ili konserviĝas en la eksponejoj. Tiuj budhostatuoj el ŝtonoj, kupro, argilo kaj jado estas



La giganta kuŝanta budho

tre delikataj kaj en la formo kaj en la farado. Ili montras la sinceran respekton de Leshan-anoj al budhoj.


Tie vidiĝas ankaŭ iuj budhostatuoj el aliaj landoj, inter ili estas budhostatuoj de la japana Kamakura, serpento-reĝo de Kamboĝo kaj birma Nirvana, ĉiu kun gaja mieno kaj ekzotikaj koloroj.

La Leshan-a budhostatuaro formis grandiozan budhisman artan galerion en la montaro. La artistoj faris ilin per skulptado, reliefado, freskado kaj surroka pentrado. La surroka skulptado estas tre malfacila, kaj en la lastaj pli ol 200 jaroj preskaŭ neniu tion provis. La Leshan-anoj estas lertaj en artoj kaj bravaj en la praktikado. Ili ripetfoje esploris la terenon kaj precipe la kvaliton de la tieaj rokoj kaj fine elektis la plej taŭgan lokon kaj faris ŝtonan

ŝtuparon sur la rokmuroj, daŭrigis la konstruadon kaj komencis la ĉizadon de supre malsupren. Ĉio ĉi estis farita sen detruo de la media ekologio kaj en prizorgo de la harmonia aranĝo de la artaĵoj kaj la monta naturo. Dank' al la penado de la pli ol 100 artistoj la ŝtonoj akiris animon kaj naskiĝis majestaj budhostatuoj.

La Orienta Budha Urbo situas ĉe la piedo de Emei-monto, fama pitoreskejo de Ĉinio. En la budha sanktejo kun areo de 200 mil kvadrataj metroj verdas la monto, prosperas arboj, lirlas rojoj, ĉe la zigzagaj padoj dissemiĝas kioskoj kaj domoj. La loko estas vere paradiza! Pro sia harmonia aranĝo de la artoj religia, skulptura kaj ĝardenistika, la loko fariĝis sinteza turisma loko. ■

Diino de hinda montvilaĝo





Majtrejo

Serpento-reço de Kamboôo



La granda budho Losana



Pri religia kredo de ĉinaj naciminoritatoj

de GUO MIN

ĈINIO estas multnacia kaj ankaŭ multreligia. La ĉinaj religioj karakteriziĝas per longa historio kaj kuna ekzistado. En Ĉinio estas budhismo, taoismo, islamismo, katolikismo kaj protestantismo. Krom taoismo, naskiĝinta en Ĉinio mem, ĉiuj aliaj estas ekzotaj.

La ĉinaj naciminoritatoj plejparte kredas je religio. En Xishuangbanna de Yunnan-provinco de Ĉinio vidiĝas multaj knabetoj en bonza robo. Tiuj malgrandaj bonzoj kaj temploj disemitaĵoj en ĉiuj vilaĝoj de tajoj formas apartan vidindaĵon. La tajoj, kiuj kredas je la Malgranda Vehiklo, rigardas bonziĝon kiel gloron. Kaj multaj 7-8-jaraj knabetoj devas bonziĝi.

En Ĉinio nur malpli ol 10% de la loĝantoj kredas je religio, tamen tie estas pli ol 20 naciminoritatoj, kiaj tibetanoj, mongoloj, tajoj kaj hujoj, kiuj kredas je religio.

Por tiuj naciminoritatoj la nombro de religianoj estas preskaŭ same granda, kiel tiu de la naciminoritatoj. La ekzemplo de la supre menciitaj tajoj iagrade prezentas la rilaton inter religio kaj naciminoritato de Ĉinio.

Historia evoluo, geografia situo kaj socia disvolviĝo kaŭzis malsamecon en rilato inter religio kaj na-

ciminoritato. Iuj de naciminoritato kredas je tiu religio kaj aliaj je iu alia; plejparto de iuj naciminoritatoj ne kredas je religio, aŭ inverse. Plejparto de la bajoj kredas je budhismo kaj malmultaj je taoismo. Multaj el la daŭra kaj evenka naciminoritatoj kredas je la religio samanismo kaj malmultaj el ili je lamaismo.

Kiel socia ideologio, religio pli-malpli influis la historion, kulturon, kutimojn kaj morojn de multaj naciminoritatoj. Samtempe kun tio, la historia disvolviĝo kaj socia progreso faris el io origine religia kutimojn kaj morojn de iuj naciminoritatoj, kiuj esence diferencas de religio.

RELIGIA KREDO KUN NACIMINORITATAJ KOLOROJ

La tri grandaj religioj de la mondo havas siajn kredantojn en Ĉinio. Tiuj religioj estas asimilitaj de ĉinaj naciminoritatoj kaj nun portas distingiĝajn naciajn kaj regionajn kolorojn.


Budhismo originis en Hindio. Ĝi estis enkondukita en Ĉinion en la 1-a jc a.K. Poste, en Ĉinio formiĝis la budhismoj tibeta, palia kaj hana. La antaŭaj du ekzistas en regionoj de naciminoritato kaj la lasta en regiono de hanoj. Ili tre diferencas inter si. La tibetlingva budhismo, alinome lamaismo, estas religio longtempe influata de ben-religio, origina en Tibeto, asimilinta la doktrinon de la lasta, kaj ekhavis tibetan koloron.

Kiel deekstera kulturo, islamismo estis enkondukita en Ĉinion antaŭ 1 000 jaroj. Miksate kun la tradicia ĉina kulturo kaj estante kun aliaj religioj, ĝi havas en si ĉinan koloron. Kvankam ĝi estas konsistiga parto de la monda islamisma kulturo, ĝi distingiĝas pro sia ĉina islamisma kulturo en konsisto, pensado kaj vivado de muzulmano.

Influata de feŭdisma klaneco, patriarkeco kaj konfuceanismo de Ĉinio, la hujoj, kiuj kredas je islamismo, havas apartan hierarkion, t.e., produktaĵojn de kombiniĝo de islama mistikismo kun la ĉina feŭda klaneco. La fondinto kaj ĉefo de la religio estas multe respektataj. Iliaj statuso, rango kaj rajto estas hereditaj. Ili ĝuas altan prerogativon en teokratia kaj sekulareco. Sub la premiso teni la fundamentan kredon je islamismo, la fondinto kaj lia tombo estas alte kulta-

Religia aktivado





Muzulmanoj en preĝo

taj. La fondinto kaj ĉefo de religio regas sian paroĥon pere de sia agento.

Longtempe influate de sia nomadismo, la kazaĥoj de nordokcidenta Ĉinio, kiuj kredas je islamismo, havas apartajn religiajn ritojn konvenajn al la vivmaniero.

Dank' al la asimiliĝo de la naciaj nutraĵoj la deeksteraj religioj sukcese diskoniĝas kaj disvolviĝas inter la ĉinaj naciminoritatoj.

SUBTENO DE LA ĈINA REGISTRARO AL LA RELIGIAJ AFEROJ

La religiaj aferoj de la ĉinaj naciminoritatoj estas multe subtenataj de la ĉina registaro.

La riparado de Potala-palaco de Tibeto daŭris kvin jarojn kaj finiĝis en 1994. Por tio la ŝtato asignis 55 milionojn da juanoj. En la lastaj jaroj la ĉina registaro asignis grandan monsumon por ripari la templojn Dazhao, Sangye kaj Baiju kaj konstrui la memorhalon por Bainqen Erdini la Deko.

En 1981, en nordokcidenta Ĉinio estis konstruita la majesta Moskeo Nanguan, unu el la simbolaj konstruaĵoj de Yinchuan, la ĉefurbo de la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono. La moskeo estas rigardata kiel landnivela turisma loko. Ĝin vizitis multaj alilandaj muzulmanoj kaj ĉinaj kaj alilandaj fakuloj pri la historio de islamismo.

En Ĉinio estas 9 500 budhismaj temploj, 400 taoismaj temploj, 4 000 katolikaj katedraloj, 8 000 kristanismaj preĝejoj kaj 26 000 moskeoj.

La ĉina registaro kuraĝigas religianojn de diversaj naciminoritatoj fondi sian religian organizaĵon. Nun en Ĉinio funkcias la Ĉina Budhista Asocio kaj aliaj sep tutlandaj religiaj organizaĵoj.

Por kulturi religiajn laborantojn de ĉinaj naciminoritatoj, krom la malnovaj seminarioj, la ĉina registaro fondis ankaŭ multajn samspecajn lernejojn, kiaj la Supera Budhisma Seminario Tibetlingva de Ĉinio kaj tiaspecaj seminarioj en Tibeto, Sichuan, Gansu kaj Qinghai. La Ĉina Islamisma Seminario kaj aliaj samspecaj lernejoj en Pekino, Shenyang, Zhengzhou, Lanzhou, Kunming, Ningxia, Qinghai kaj Xinjiang kulturis imamojn kaj mulaojn por la ĉinaj nacimi-

noritatoj kredantaj je islamismo. Oni ankaŭ funkciigas religian kurson en moskeo, gvidatan de imamoj kompetentaj en instruado. Krom korano, la kursanoj lernas ankaŭ aliajn sciojn. La tiuspeca edukado estas prenata kiel rimedo kulturi junajn imamojn taskotajn prezidi religiajn aktivadojn.

INTEGRECO DE AMO AL RELIGIO, PATRUJO KAJ NACIO

Ĉu ateistoj-komunistoj havas ion komunan kun religio? Kiel statas la religioj en la pordmalfermita Ĉinio? Ĉio ĉi estas multe zorgata nuntempe.

S-ro Ding Guangxun, vicprezidanto de la Ĉina Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kategorie diris: "Niaopinie, ne eblas integri la kristanisman teologion kaj marksisman filozofion. Kaj plie, ni ne volas tion... Tamen la ĉina kristanismo kaj marksismo havas ion komunan kaj en la politikoj kaj en la sociaj problemoj. Ĉi-flanke ili povas kunlabori kaj labori en la unuecfronto." Ĉi tie, la "io komuna" signifas ami sian propran nacion kaj sian propran patrujon.

La religianoj de la ĉinaj naciminoritatoj ĉiam havas la gloran tradicion ami sian patrujon kaj defendi ĝian integrecon.

Kortegano Basiba de Yuan-dinastio (1271-1368), kiu respondecis pri religiaj kaj tibetaj aferoj, estis la kvinageneracia ĉefo de la sekto Sajia de la tibeta budhismo.


Hujo Wang Jingzhai, kiu iniciatis la Huj-nacian Kontraŭjapanan kaj Nacisavan Asocion en Henan-provinco de Ĉinio en 1937, estis imamo.

S-ro Geda, vicprezidanto de la iama popola registaro de Xikang-provinco kaj abato de Baili-templo de Garze, estis venenita de spiono aŭguste de 1950 pro tio, ke li proponis al la tibeta registaro partopreni en la traktado pri paca liberiĝo de Tibeto.


Viva budho Qiazha, abato de Zhabulun-templo de Tibeto postulas, ke ĉiuj lamaoj en la templo bone lernu sutrojn kaj mem kulturu. Li tre atentis pri patriota edukado. Li postulas, ke ĉiuj lamaoj estu por stabileco, kontraŭ separatismo kaj heredu la gloran tradicion de ĉiuj Bainqen-lamaoj pri amo al patrujo kaj religio.

Li diris, ke depost la paca liberiĝo de Tibeto la ĉina registaro alte taksis pri la disvolviĝo de Tibeto kaj ĉiuj provincoj kaj municipoj multe subtenis ĝin. Se oni bone faros la nacian kaj religian laboron en Tibeto, do la stabileco kaj unuiĝo de Tibeto estos nerompeblaj.

La supre menciitaj religianoj ĉiuj estas modeloj de integro de amo al religio, patrujo kaj la ĉina nacio.



Pagodo el perloj



Kolicoj el perloj



Enmeto de perlo-kerno

Hejmloko de perloj en Ĉinio

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de YAN JIN

HEPU-gubernio de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, sud-okcidenta Ĉinio, estas konata kiel hejmloko de perloj. Ĉi-printempe, mi vizitis la lokon. Tie mi vidis multajn restaĵojn de eroziitaj kaj nekompletaj perlokonkoj. El tio videblas la prospero de perlofiŝado siatempe.

Bailong-golfo de Hepu pro siaj malfortaj ventoj kaj ondoj, milda tajdo, modera akvosaleco kaj multaj algoj taŭgas por kresko de perlokonkoj. De la antikveco la loko estas fama meleagrena maro de Ĉinio. La perloj de Hepu estas famaj pro sia kompaktecio, firmeco, rondeco, blankeco kaj brileco.

Oni diras, ke en la internacia merkato oni nomas la perlojn de Italio okcidentaj perloj, tiujn de Japanio orientaj kaj tiujn de Hepu sudaj.

Perloj estas altvaloraj, tamen perlofiŝistoj estis malriĉaj antaŭe. Por dekoracii siajn palacojn, imperiestroj de ĉiuj dinastioj de Ĉinio sendis kontroli la Hepu-anojn en perlofiŝado. Tiam, perlofiŝado estis ege malfacila. Oni devis per ŝnurego ligi ŝtonon al si kaj enakviĝi por serĉi perlokonkojn en marfundo. Antikva poemo pri perlofiŝado priskribis, ke sennombraj perlofiŝistoj perdis sian vivon en marfundo kaj fariĝis nutraĵo de ŝarkoj, kaj ilia sango ruĝigis maron. Estis videble, ke en la antik-

La perlo-kulturejo en Hepu

Foto de YANG XIUYUN





En tiu domo laboris oficistoj senditaj de imperiestroj por kontroli perlofiŝadon.

veco ĉiu perlo estis malfacile akirita de perlofiŝistoj.

En 1955 sciencistoj de la Marbiologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj faris en Hepu ĉelokan esploradon pri perlo-produktado. En 1958 fondiĝis la unua perlo-kulturejo en Hepu. En 1962 la unuaj perlokonkoj estis sukcese kulturitaj, kio metis finon al la historio de postĝinta natura perlofiŝado. S-ro Zou, direktoro de la Perlo-industria Kompanio de Hepu, konigis al mi: "Kulturado de unu perlo bezonas ĉ. tri jarojn. Dank' al renovigo de la tekniko, la kulturado mallongiĝis."

Babilante, ni venis al perlokovejo. Tie viciĝas basenoj unu post alia. En ili estas perlokonkidoj elkovitaj per artefarita fekundigo. En ĉiu baseno estas kulturataj dekmiloj da perlokonkoj, nevideblaj nudokule. Iuj jam kreskis en grandeco de sojfabo. Direktoro Zou diris, ke perlokulturado de la larvokovado al konkiĝo estas longtempa. Ĉe sia metamorfozo, larvoj estas malfortaj kaj malfacile flegeblaj. En la temperaturo kaj saleco estas malpermesita ajna ekarto. Sekve, laboristoj ĉiam atente observas, flegas kaj nutras ilin en la kovejo ĉu somere ĉu vintre.

Oni konigis, ke sen naturaj perlokonkoj, la perlokulturado malfacile sukcesas. Ĉar la kulturita perlokonko pli kaj pli malgrandiĝas kaj degeneras, estas malfacile enmeti en ĝin grandan perlokernon. Kaj krome estas grandaj la mortokvanto kaj kvanto de elverŝitaj perlo-kernoj. Ĉio ĉi malutilas al dikiĝo de perlamota tegaĵo. Tial, en la certa tempo oni devas kovi kaj kulturi per naturaj

konkoj por altigi la kvaliton de perlokonkoj.

Forlasinte la kovejon, ni venis al kernogreftejo. Tie ĉ. 20 knabinoj per tranĉileto malfermis la konkojn en grandeco de pugno, poste per greftilo faris en ĝia karno malgrandan breĉon kaj fine enmetis en ĝin malgrandegajn blankajn kernojn unu post alia. Iu knabino klarigis: "Kiam konkoj malfermas sian mantelon, sableroj enŝoviĝas kaj algluiĝas al la karno de konkoj. Tiam la stimolitaj konkoj senĉese sekrecias likvaĵon por involvi la sablerojn. Kun tempopaso la sableroj estas tegitaj de tavolo post tavolo da sekreciaĵoj kaj fine ili transformiĝis en brilajn perlojn." Ĉiu knabino povas grefti 100 000 konkojn jare.

En Hepu funkcias 1 088 tiaj kulturejoj, inkl. de familiaj kulturejoj. Nun pli ol 20 000 homoj sin okupas je tiu laboro, 90% de la kulturejoj ĉiu havas fiksan kapitalon de pli ol 100 mil juanoj.

Fine mi vizitis eksponejon de perlaĵ ornamaĵoj. En ĝi eksponiĝas perlaĵ kolieroj, fingroringoj, orelringoj, broĉoj, klipoj kaj multaj aliaj ornamaĵoj. La diversformaj brilaj perlaĵ ornamaĵoj de antikve estas rigardataj kiel simbolo de pureco, perfekteco, nobleco kaj aŭtoritateco. Ili estis same valoraj kiel jado.

La sudaj perloj de Hepu antaŭe estis ĝenerale uzataj kiel ornamaĵoj de kronoj kaj roboj de imperiestroj, haroj, oreloj, fingroj, veturiloj k.a. Ili estis tributo al imperiestroj. Tiam imperiestraj parencoj kaj altranguloj ne nur portis sur si perlojn kiel ornamaĵojn, sed ankaŭ enterigis ilin kiel kuntombigitaĵojn. Kiam la imperiestra patrino Cixi de Qing-dinastio (1616-1911) mortis, oni entombigis kune kun ŝi ŝuojn, kronon, robojn k.a. inkrustitajn per perloj. La perloj konservataj en la Muzeo de la Imperiestra Palaco en Pekino plejparte estis produktitaj en Hepu.

Kun pliboniĝo de la popola vivo, perloj jam fariĝis ornamaĵoj por ordinaraj homoj. Kaj krome ili havas ankaŭ alian uzadon.

Dank' al la senĉesa esplorado kaj reformado en multaj jaroj, altiĝis la prilabora teknologio de perloj en Ĉinio. La kvalito de zorgeme prilaboritaj Hepu-aj perloj atingis la internacian nivelon en la koloro, brileco kaj firmeco. En 1983 la ĉina komerca delegacio montris Hepu-ajn perlojn en la unua ekspozicio "Tago de oro" en Berlino, Germanio, kaj tio faris grandan sensacion en okcidenta Berlino kaj altiris al si multe da juvelistoj de la mondo.

Krom ornamado, perloj ankaŭ estas valoraj por fari medikamentojn kaj beligaĵojn. Karno de perlokonkoj kun riĉa proteino kaj 20 specioj da aminoacidoj bezonataj de la homoj estas frandaĵo. ■

TENG KE:

Vestoj kaj la Malpermesita Urbo

LA Malpermesita Urbo estas unu el la mirakloj en la monda arkitektura historio. Ĝi funkciis kiel imperiestra palaco en la dinastioj Ming kaj Qing dum pli ol 500 jaroj. Sed nun, la de mi preparolata "Malpermesita Urbo" konsistas el 227 kompletoj da vestoj, kiuj surhavas la bildojn de Wumen-pordego speciala por en- kaj elirado de la imperiestroj, nupta domo de la imperiestroj, klozonea horloĝo en la Muzeo de Trezoroj, buntaj porcelanaĵoj, kioskoj en la imperiestra ĝardeno, antikvaj arboj, floroj, herboj, bestaj figuroj sur la palacaj firstoj, versparoj sur la palacaj kolonoj k.a. Ili ŝanĝas siajn formojn sur la scenejo, montrante al la spektantoj la antikvan kulturon de la Oriento.

La vesto-parado montris preskaŭ ĉiujn konstruaĵojn sur la akso de la Malpermesita Urbo. Kaj la plej impona estis Taihe-halo, kie la imperiestroj okazigis grandiozajn ceremoniojn. La aŭtoro montris la detalojn spegulantajn la imperiestran majestecon: grandega skarлата ŝalo elvolvita montris Taihe-pordegon. La orbrilaj latunaj pecoj aranĝitaj po 9 vertikale kaj horizontale simbolis la najleĝojn sur la pordego. En la okuloj de la antikvaj ĉinoj 9 estis maksimuma cifero kaj la najleĝoj simbolis la superan aŭtoritatecon de la imperiestroj. Sur Taihe-pordego la plej okulfrapaj estas la drakokapo gardantaj speciale la imperiestran familion kontraŭ perversaj fortoj. En la parada kunveno ili estis brilegaj brustornamaĵoj.

Oni scias, ke Taihe-halo, 31 m.

alta, majestas sur la 3-eskalaj terasoj kun balustrado el blanka marmoro. Sur la scenejo aro da knabinoj, en blankaj vestoj kaj blankaj cilindraj ĉapoj kun nubformaj desegnoj sur si, aspektis kiel skulptitaj trajtoj kaj kolonoj. Ankaŭ la braceletoj kaj orependaĵoj similis al la skulptitaj balustradoj. La sankta koloro en la fono de la ruĝaj muroj de Taihe-halo kaj oraj glazuritaj tegoloj profunde impresis la spektantojn, samkiel la sveltaj homfiguroj.

Por reliefigi la arkitekturajn trajtojn de la Imperiestra Palaco, la aŭtoro brave disvolvis sian imagipovon, faris troigon kaj transformon en la fasonado de la vestoj, tial sur la scenejo ĉiuj vestoj aspektis kurioze kaj mistere, tamen ĉio strikte rilatis al la temo. Sur la scenejo la pavilono "Eterna Printempo" kun ombrelforma tegmento fariĝis grandega kontraŭpluva ĉapelo uzata speciale en suda Ĉinio, dum la levita tegmentando similis al ŝultra kuseno de transportisto. Sur la scenejo la kolonoj kun skulptitaj drakoj fariĝis broditaj virinaj roboj kaj la soklo de la klozonea horloĝo transformiĝis en krinolinon broditan el oraj fadenoj. Kompreneble tiuj vestoj elspiris fortajn modernajn trajtojn. Ili estis senmanikaj, malavare dekoltitaj, tre mallongaj kaj forte odoris la furorecon.

La koloroj estas gravaj rimedoj por manifesti la imperiestran majestecon. Laŭ la tradiciaj konceptoj de la ĉinoj ruĝo kaj flavo estas bonaŭguraj. Ili simbolas feliĉon kaj riĉon. La konstruaĵoj de la Malpermesita Urbo ĝuste estas sur la fono de tiuj koloroj. Pro tio



Modelino portas veston en formo de la pavilono "Eterna Printempo".

la aŭtoro multe uzis ruĝon kaj flavon en la vestoj kaj sub la lampoj tiuj koloroj estis pli klaraj, kio trafe montris la imponecon kaj grandiozecon de la Malpermesita Urbo.

Sub la variantaj lumoj, bela muziko kaj alternaj dekoracioj oni sentis, ke la "Malpermesita Urbo" moviĝas. En tiu mistera medio oni perceptis ne nur la vestojn kaj konstruaĵojn, sed ankaŭ la historion kaj legendojn...

Jen aperis paro da modelinoj kun kvar broditaj ĉinaj ideogramoj en la signifo "justa kaj malakaŝema" sur la ŝultroj. Tiuj ideogramoj estas sur la tabulo super kaj malantaŭ la trono en Qianqing-halo. Ekde la meza periodo de Qing-dinastio imperiestro skribis sekretan dekreton pri heredo de la trono en du ekzemplerojn, unu li metis malantaŭ la tabulon kaj la alian tenis ĉe si mem, kun la celo: kiam la imperiestro mortis, la tronoheredanto publikigu lian dekreton per la du ekzempleroj por certigi ĝian aŭtentikecon.

Vidante la modelinon kun verd-muslinaj kapornamaĵoj kaj en bruna jupo kun tuber-formaj desegnoj, oni nature rememoras la legendon pri maljuna cipreso en la Imperiestra Ĝardeno interne de la Malpermesita Urbo: La imperiestro Qianlong (1736-1796 sur la trono) de Qing-

(Daŭrigo sur p. 45)

Ĉu la ĉina lingvo malfacila? (II)

de ZHANG QICHENG*

MIA aserto pri la ĉina lingvo estas verŝajne tre mirinda, ĉar mi volas diri, ke la ĉina lingvo estas unu el la plej simplaj, plej logikaj kaj sekve sufiĉe facile lerneblaj lingvoj.

La ĉina lingvo havas multajn “mankojn” de gramatikaj reguloj, kaj tiuj “mankoj” ĝuste prezentas ĝian avantaĝon.

Antaŭ ĉio, en la ĉina lingvo ne ekzistas genro, kiu sin trovas en multaj okcidentaj lingvoj. Ekz., en la germana lingvo, “blume” (floro) estas ina en genro kaj “berg” (monto) estas vira. Kial? Ĉu estas pro tio, ke floro estas ĉarma kaj alloga kiel bela knabino? Kaj ĉar monto estas kvazaŭ giganta viro firme staranta, do ĝi estas vir-esenca? Por ĉinoj, tia genro estas vere neimagebla. Tiurilate, Zamenhof estis tute prudenta, ankaŭ li kreis Esperanton sen tia neracia fenomeno.

En la ĉina lingvo ne ekzistas ankaŭ kazo, ne estas diferenco inter nominativo, posesivo kaj akuzativo, ĉar en la ĉina lingvo oni esprimas sian ideon tute laŭ logiko de pensado. Ekz., en la frazo “mi amas ŝin”, certe “mi” estas nominativo kaj “ŝi” akuzativo, inverse, “ŝi amas min”, sendube “ŝi” fariĝas nominativo kaj “mi” akuzativo. Sekve, en la antaŭa frazo, tute ne necesas aldoni finaĵon “n” post “ŝi” por montri la akuzativecon kiel en Esperanto, aŭ uzi la vorton “her” anstataŭ “she” kiel en la angla. Inverse, estas same, ke tute ne

necesas aldoni “n” post “mi” aŭ anstataŭigi “I” per la akuzativo “me” laŭ la angla. En la kazo de posesivo, ĉinlingve oni simple aldonas la vorton *de* post la nomo aŭ pronomo, ekz., *wo-de* (mia), oni ne bezonas uzi alian vorton “my” kiel en la angla. Alia ekzemplo: *wo fuqinde fangzi* (la domo de mia patro), ankaŭ en tiu ĉi frazo, oni simple aldonas la vorton *de* post la substantivo *fuqing* (patro), do estas malsame al Esperanto, en kiu oni devas uzi la prepozicion “de” kaj ŝanĝi la vortordon. Tiuflanke, oni povas diri, ke la ĉina lingvo estas pli simpla kaj oportuna ol Esperanto. En la ĉina lingvo, la nominativo estas ĝenerale antaŭ la predikato kaj la akuzativo post la predikato. La vortordo estas tute logika kaj klara, do oni ne konfuziĝas pro la manko de kazo.

La vorto *de* estas ankaŭ uzata por formi la adjektivon, ekz., *kun-nande* (malfacila), *meilide* (bela). Sed iaokaze, oni ne aldonas *de* por esprimi posesivon aŭ adjektivon. Ekz., en la supre citita frazo *wo fuqing* (mia patro), oni ne aldonas *de* post la pronomo *wo*; kaj en la esprimo *honghua lüye* (ruĝa floro kaj verda folio), *de* ankaŭ ne estas aldonata post la adjektivaj vortoj *hong* kaj *lü*. Ĉar laŭ la kutima vortordo de la ĉina lingvo, oni jam povas kompreni la sencon de ambaŭ adjektivoj, sekve la vorto *de* ne estas nepre necesa. Tio plene montras, ke la principo de “neceso kaj sufiĉo” tute validas por la ĉina lingvo.

Ankaŭ ne ekzistas tenso en la ĉina lingvo por verboj. Tio certe

estas surpriza por alilingvanoj. Ĉu la ĉinoj ne havas la koncepton pri tempo? Certe ne! Ĉar la ĉinoj esprimas siajn ideojn tute laŭ la reguloj de logiko, se la esprimitaj ideoj estas logike nekonfuzaj, oni ne plu donas klarigojn en sia parolo aŭ skribo per gramatikaj metodoj. Jen la ekzemploj: en la frazo “Hieraŭ mi hejme vespermanĝis”, ĉinlingve oni ne uzas preteriton por la verbo “manĝi”, ĉar ja temas pri hieraŭ, memklare, la agado estas pasinta, kial do ankoraŭ necesas uzi la verbon en formo de preterito? En la frazo “ĉu li venos morgaŭ”, ĉinlingve oni ne uzas la tensecon de futuro por la verbo “veni”, ĉar la senco de “os” jam memklariĝas en la vorto “morgaŭ”. Nature, la ĉinoj ankaŭ havas la neceson por esprimi pasintecon aŭ estontecon. Ankaŭ tiukaze, oni ne uzas tensecon de preterito aŭ futuro, sed simple aldonas la vortojn *yi-jing* (jam) antaŭ la verbo kaj *le* (fini) aŭ *guo* (jam) post la verbo por signifi la pasintan agadon. Ekz., *Ni chi bao le ma* (Ĉu vi satmanĝis), *Wo yi-jing chi bao le* (Mi jam satmanĝis), *Wo chi guo wufan le* (Mi jam tagmanĝis). Por signifi la venontecon, oni aldonas la vorton *jiang* (estonte) antaŭ la verbo, ekz., *Wo jiang qu canjia guoji shijieyu dahui* (Mi partoprenos la U.K.). Al la ĉina lingvo ankaŭ mankas la participo, ĉar oni havas alian rimedon por esprimi la “antan” agadon. La rimedo estas aldoni la vortojn *zhengzai* (ĝuste tiam) antaŭ la verbo, ekz., *Wo zhengzai du shu* (Mi estas leganta libron). El la ekzem-

ploj *chuanpo le de yifu* (eluzita vesto) kaj *du guo de shu* (tralegita libro), oni rimarkas, ke *le* kaj *guo* ankaŭ estas uzataj por la participo de preterito.

En la ĉina lingvo ne ekzistas modo por verboj. Malsame al Esperanto, oni ne uzas “u” por imperativo aŭ “us” por subjunktivo. Anstataŭ “u” oni nur aldonas la helpan vorton *ba* post la verbo, aŭ pli ĝentile, aldonas la vorton *qing* (bonvolu) antaŭ la verbo. Kaj anstataŭ “us”, oni kutime uzas la subjunkcion *ruguo* (se) antaŭ la verbo.

Unuvorte, en la ĉina lingvo, la verbo ne varias sub ajna kondiĉo, dume en multaj aliaj lingvoj, la verbo ofte varias en siaj strukturoj gramatike, sekve ili fariĝas tre komplikaj kaj kapdolorigaj. Estas interese, ke ĝuste pro tio ke ĉinlingve la verboj ne varias, ĉinoj ofte misuzas la verbojn, kiam ili parolas en Esperanto aŭ aliaj lingvoj, se ili ankoraŭ ne perfekte posedas tiujn lingvojn.

En la ĉina lingvo ankaŭ ne estas diferenco inter singularo kaj pluralo. Ekz., “Li havas tri filojn kaj du filinojn”, por ĉinoj, la aldono de plurala finaĵo “j” estas nenecesa kaj superflua. La kialo estas: la numeraloj “tri” kaj “du” jam mem evidente montras, ke la koncernaj substantivoj estas pluralaj. La predikato “estas” kaj aliaj verboj restas tute samaj sen ajna variado ĉu por la singulara substantivo ĉu por la plurala. Tio tute similas al Esperanto. Ankaŭ ne estas singularo aŭ pluralo por la adjektivoj, ekz., “unu ruĝa floro” aŭ “tri ruĝaj floroj”, kompreneble la antaŭa “ruĝa” estas singulara kaj la lasta plurala, do tute ne necesas diferencigi ilin.

En la nuntempa ĉina lingvo, oni uzas la vorton *men* post la plurala persona pronomo aŭ persona substantivo, ekz., *women* (ni), *nimen* (vi), *tamen* (ili), *xianshengmen* (sinjoroj), *zhuanjiamen* (fakuloj) ktp. Sed se antaŭ la persona substantivo estas jam numeralo por montri la pluralon, oni ne plu

aldonas *men*, ekz., oni ne uzas *sange zhuanjiamen* (tri fakuloj). La plurala aldonaĵo *men* ankaŭ ne validas por bestoj aŭ aliaj estaĵoj, ekz., oni ne uzas *goumen* (hundoj) aŭ *shumen* (libroj).

Al la ĉina lingvo ankaŭ mankas tiaj relativaj vortoj kiel “kiu, kio, kie, kia”. Kiam oni uzas la relativon en Esperanto aŭ aliaj lingvoj, la ĉinoj ĝenerale uzas adjektivan propozicion, ekz., la frazo “D-ro Zamenhof, kiu kreis Esperanton, estis okulisto”, estas ofte ĉinigita jene: *chuangzao shijieyu de zamenhof boshi shi yanke yisheng* (simile al: “Esperanton kreinta D-ro Zamenhof estis okulisto”). Pro tio, ke ne ekzistas la relativoj, la ĉina lingvo evitas la difekton de aliaj lingvoj, kies frazoj ofte fariĝas tre longaj kaj komplikaj pro la uzado de pluraj relativoj. La ĉinoj ĝenerale ne ŝatas longajn frazojn kaj kutimiĝas al la koncizaj kaj mallongaj.

Ankoraŭ mankas al la ĉina lingvo la artikolo, ĉar ŝajnas al ĉinlingvanoj, ke la artikolo ne estas nepre necesa. Ekz., “sub la standardo de verda stalo” oni povas traduki en la ĉinan lingvon sen la artikolo “la”. Tiu manko ankaŭ ebligas la ĉinojn eviti la ĝenon kiel ĝuste uzi la artikolon en sia parolo aŭ skribo.

Estas specifa vortospeco en la ĉina lingvo nomata “mezura vorto”, kiu estas ĉiam uzata kune kun la numeralo. Tiaj “mezuraj vortoj” nombriĝas je kelkdek, el kiuj la ĉefaj estas *ge*, *zhi*, *gen*, *kuai* k.c. Ordinare, *ge* estas uzata por altgradaj vivaĵoj aŭ estaĵoj kiel homo, ŝtato kaj nacio, *zhi* por bestoj aŭ ordinaraj objektoj, ekz., *yi zhi gou* (unu hundo), *gen* por objekto kun longeco aŭ alteco, ekz., *yi gen xian* (unu peco da fadeno) kaj *kuai* por objekto en plata formo, ekz., *si kuai dangao* (kvar pecoj da kuko). Tiuj “mezuraj vortoj” estas laŭkutime fiksitate uzataj, oni ne povas uzi ilin kontraŭkutime, ekz., oni ne povas uzi *zhi* anstataŭ *ge* por homo. Tio estas ia specifa kutimo, familiariĝi kun tia

kutimo certe estas ne facile por la alilingvanoj. Tamen, tio efektive ne estas grava afero.

Ĉar la ĉina lingvo estas logika kaj racia, kaj ankaŭ la vortordo estas evidente klara, en la pasinta longa tempo de pli ol 2 000 jaroj, la ĉinoj lernis sian lingvon sen gramatika kurso. Ĝis la lasta periodo de Qing-dinastio, t.e. antaŭ pli ol cent jaroj, erudiciulo Ma Jianzhong (1845-1990), kiu scipovis la lingvojn anglan, francan, grekan kaj latinan, gramatike analizis la antikvan ĉinan lingvon laŭ la modelo de eŭropalingva gramatiko kaj verkis la unuan gramatikon por la ĉina lingvo. Tamen, malgraŭ tio, eĉ en la posta periodo de multaj jaroj, oni lernis nenian gramatikon en sia lernado de la ĉina lingvo. Kiam mi estis lerneano dum mia infanaĝo, mi ne havis gramatikan kurson, kaj nur dank’ al la longdaŭra lernado de ideogramoj, legado kaj recitado de bonstilaj verkaĵoj aŭ versaĵoj, mi bone posedis la nacian lingvon.

Eble oni dubas, ke la simpleco de la ĉina lingvo perdigas ĝian esprimovon. Ne! Tute male, ĝi estas tre esprimoriĉa. Se ne estas tiel, kiel Ĉinio povas naski tiajn filozofiajn klasikaĵojn de Konfuceo kaj Laozi, kaj tiajn superbajn beletraĵojn, kiaj poeziaĵoj de la dinastioj Tang (618-907) kaj Song (960-1279), “Tri Regnoj” kaj “Ruĝdoma Songo”?

Konsekvence, ni povas konkludi per elokventaj argumentoj, ke la ĉina lingvo ne estas tre malfacila kaj ankaŭ la grandnombraj ideogramoj ne estas nevenkeblaj baroj. Laŭ la studo de fakuloj, la lernado de la ĉina lingvo estas ofte malfacila je la komenco, kaj ju pli progresas la lernado, des pli ĝi ffaciliĝas. Popoldire, ĉiuj aferoj komenciĝas kun malfacilo. Do, ĉu la lernado de la ĉina lingvo ne konformas al tiu regulo de evoluado?

*La aŭtoro estas vicprezidanto de ĈEL kaj honora membro de UEA.



Sur la ruino de la primitiva vilaĝo Banpo

La ruino de la primitiva vilaĝo Banpo

EN la orienta antaŭurbo de Xi'an, la ĉefurbo de la provinco Shaanxi, proksime de la fama Muzeo de Terakotaj Soldatoj kaj Ĉevaloj de Qin-dinastio (221-206 a.K.), troviĝas muzeo de antaŭhistoria ruino — Banpo-ruina Muzeo, konstruita sur la ruino de tipa matriarka tribo ekzistanta antaŭ 6 000 jaroj en la baseno de la Flava Rivero. Nun ĝi estas protektata kiel grava ŝtata historia vidindaĵo.

En Xi'an mi vizitis ĉinan arkeologon s-ro Shi Xingbang, kiu respondecis pri prifosado kaj ordigado de la ruino Banpo. Je mencio pri prifosado de Banpo, la pli-ol-70-jara arkeologo emocie diris, ke la ruino Banpo, trovita en 1953, havas areon de ĉirkaŭ 50 000 kvadrataj metroj, kiu konsistis el loĝejo, fajencejo kaj tombejo. De 1954 ĝis 1957 oni faris 5-foje grandskalan prifosadon sur areo de ĉirkaŭ 10 000 kvadrataj metroj, malkovris la ruinojn de 45 loĝdomoj, 2 staloj, 200 keloj, 6 bakuloj kaj 250 tomboj kaj elterigis ĉirkaŭ 10 000 laborilojn kaj vivbezonaĵojn. Krome, estis trovitaj ankaŭ multaj bestaj ostoj,

frukto-kernoj kaj putriĝintaj milio-grajnoj. Sub iu loĝdoma ruino oni trovis fajencan poton kun kovrilo, en kiu bone konserviĝas semaj ŝeloj. La grajnoj jam putriĝis, tamen la ŝeloj ankoraŭ estas klare rekoneblaj.

Tiu ĉi ruino mem estas muzeo: Ĝi vidigas la aktivadon de homoj en la primitiva tribo kaj figure spegulas la tiaman socian vivon.

Helpe de s-ro Wei Guang, direktoro de la Banpo-ruina Muzeo, mi vizitis la eksponejon de elteri-

gitaj historiaj restaĵoj kaj la ekspoziciejon de la ruinoj.

En la eksponejo de elterigitaj historiaj restaĵoj eksponiĝas ĉefe laboriloj, vivbezonaĵoj kaj metiartaĵoj de tiamaj Banpo-anoj.

La laboriloj estis faritaj ĉefe el ŝtonoj kaj ostoj. Inter la ŝtonaj laboriloj troviĝas hakilo, ŝovelilo, muelŝtono, ŝpinrado kaj aliaj, sume dekelkaj specoj, kaj inter la ostaj — tranĉilo, kudrilo, sagpinto, fiŝhoko kaj similaj. La fiŝhoko kaj kudrilo estas faritaj plej deli-

Fajencaĵo, kiu surhavas bildon de homa vizaĝo kun fiŝaj vejnoj



kate, kun akra pinto kaj fajna trueto. Krome, troviĝas ankaŭ fajencaj skrapilo kaj fajlilo.

Vivbezonaĵoj estas ĉefe fajencaj en formo de bovlo, kuvo, urno, potoj kaj botelo. Ili estis uzataj kiel manĝilo, akvujo, kuirilo kaj rezervujo. La fajencaj vivbezonaĵoj plejparte estas ruĝaj, nur malmultaj — grizaj kaj nigraj. Sur la fundo de tiuj fajencaj vivbezonaĵoj estas klaraj mataj kaj tolaj vejnoj, kio montris, ke antaŭ 6 000 jaroj jam aperis tekstila industrio.

En praktikado de laborado kaj vivado Banpo-anoj akiris atingojn ankaŭ en kulturo kaj arto. El la elterigitaĵoj troviĝas 113 specimenoj el 22 specoj da gravursignoj de regulaj formoj kaj simplaj strekoj, eble per kiuj la Banpo-anoj faris nombradon aŭ notadon. La ĉina skriba lingvo originis ĝuste el tiuj gravursignoj.

Pentrarto koncentre manifestiĝas en koloraj fajencaĵoj, plejparte kun la temo de laborado kaj la naturo, ekzemple, fiŝo kun larĝe malfermita buŝo, kuranta cervo kaj fiŝreto ĉiuj pentritaj figure kaj vivece. La Homa Vizaĝo kun Fiŝaj Vejnoj estas reprezentanta bildo de la koloraj fajencaĵoj de Banpo. Ĝi esprimas la deziron kapti multajn fiŝojn kaj ankaŭ havas ian rilaton kun totemismo.

Skulptaĵoj de Banpo plejparte estas kovriloj de fajencaĵoj, en for-

mo de homa, birda kaj besta kapoj kaj fajlilo. La ornamaĵoj estas faritaj el ostoj, juvel-ŝtonoj, bestaj dentoj, ŝtonaj bidoj, fajencaj ringoj kaj diversspecaj konkjoj.

Iuj el la elterigitaj historiaj restaĵoj havas apartajn trajtojn, ekzemple, fajenca vaporumilo, ŝtona hakilo kun truo por tenilo, fiŝhoko kaj fiŝforko kun pikaj dornoj kaj akvo-ĉerpa botelo kun akrapinta fundo farita konforme al la principo de gravitocentro.

En la ekspoziciejo de la ruino estas eksponata parto de la loĝareo de Banpo-anoj kun origina aspekto kaj ĉirkaŭ 3 000 kvadrataj metroj. La elterigitaj loĝdomoj de la ruino Banpo estas duone subteraj aŭ tute surteraj, en formo de kolono kaj kubo. En la mezo de ĉiu loĝdomo troviĝas forno. La ĉefaj konstrumaterialoj de la domoj estas pajlo-koto kaj ligno.

Laŭ la aspekto de la tuta ruino oni povus konstati, ke la Banpo-anoj vivis vivon de fikso-loĝado. En la ekspoziciejo de la ruinoj oni povas vidi unue 300-metran kanalon ĉirkaŭ la loĝareo, kun profundo kaj larĝo de 5-6 metroj respektive. Ĝi estis uzata por ŝirmi la loĝareon kontraŭ atako far sovaĝaj bestoj.


En la centro de la loĝareo estas granda domo kun totala areo de ĉirkaŭ 160 kvadrataj metroj, kiu servis kiel kunvenejo de la triba-

noj. Ĉirkaŭe de ĝi estas privataj dometoj loĝataj de la tribanoj, ĉiu kun meznombra loĝareo de 20 kvadrataj metroj. Esplorinte ruinion de loĝdomo kaj koncernajn elterigitajn historiajn restaĵojn, oni konstatis, ke la Banpo-anoj jam fikse loĝis tie por tre longa tempo. Ĉe ĉiu domo lokiĝas unu aŭ pluraj kolon- aŭ kub-formaj kejoj, kiel tenejoj aŭ rezervejoj. Ambaŭflanke de la loĝareo kaj ĉe la ĉirkaŭkanalo estas ruinoj de du neregulaj konstruoj kun densaj palisotruoj ĉirkaŭe. Oni konjektis, ke ili estis staloj de hejmaj bestoj. Oriente de la loĝareo estas bakujo por fari fajencaĵojn.

Norde de la loĝareo, ekster la ĉirkaŭkanalo, estis publika tombejo, en kiu plejparto de la tomboj entenis nur unu mortinton kun escepto de kelkaj entenantaj plurajn mortintojn de sama sekso. Mortinta infano estis enmetita en urnon kaj enterigita apud la loĝdomo.

Por ke la vizitantoj bone konu la vivon de Banpo-anoj, en la muzeo oni restarigis matriarkan vilaĝon apud la ekspoziciejo de la ruinoj laŭ la elfositaj materialoj. La vilaĝo okupas areon de ĉirkaŭ 33 000 kvadrataj metroj dividitan en du partojn por vivado kaj laborado. En la vilaĝo la turistoj povas ne nur ĉasi antikvecajn kuriozaĵojn, distri sin kaj bone ripozi, sed ankaŭ partopreni en celebraj kaj kultaj aktivadoj reflektantaj la laboron, vivon kaj amaferon de Banpo-anoj, propraokule vidi, eĉ propramane sperti faradon de prahistoriaj instrumentoj kaj artaĵoj, kaj ĝui Banpo-stilan bankedon. Krome, en la centra granda prezentejo, tetrinkejo, drinkejo kaj triba kunvenejo oni povas apreci ankaŭ prahistoriajn morojn, vestojn kaj ornamaĵojn, primitivan luktadon kaj mirindan ludadon de ĉina antikva muzikilo *Ŝjun*. En nokto la turistoj povas partopreni en la antikva aktivado Nokto de Banpo. Tiuj aktivadoj kondukas la turistojn kvaŝaŭ en la antaŭhistorian socion, por ke ili spertu ne nur la krudajn morojn, sed ankaŭ fortan primitivecon. ■

Restaŭrita bakujo



Vojaĝo sur Lancang-Mekongo

EN verda sezono nia pasaĝera ŝipo “Princino” ekveturis kun longa sirenado kaj malrapide iris en la larĝan Lancang-riveron.

Lancang-rivero, konata kiel Orienta Danubo, fontas el Qinghai-provinco de okcidenta Ĉinio. Ĝi fluas suden tra orienta Tibeto kaj okcidenta Yunnan, trans la landlimon ĉe la enfluejo de Nanla-rivero en Xishuangbanna de Yunnan-provinco. Ĝi, nomata Mekongo ekster Ĉinio, iras tra Birmo, Laoso, Tajlando, Kamboĝo, Vjetnamio kaj enfluas en Pacifikon, kun totala longo de 4 880 km.

De la antikveco la internacia rivero Lancang-Mekongo estas natura vojo inter Ĉinio kaj landoj de Sudorienta Azio kaj ankaŭ ligilo de loĝantoj ĉe la rivero, kiuj rigardas ĝin kiel vivofonton kaj simbolon de amikeco. Estis la unua fojo, ke pasaĝera ŝipo granda kiel “Princino” veturis sur la rivero. Kaj nature, ĝi estis bonvenigata de loĝantoj ĉe la rivero. En la tago de ĝia unua vojaĝo iuj venis al la riverbordoj kun torĉo en mano, kaj aliaj svarme eliris el sia vilaĝo por propraokule vidi la grandan ĉinan ŝipon. Iliaj esperplenaj okuloj sentigis al ni, ke estas tempo malfermi la internacian navigojon.

“Princino” estas 120-tonela ŝipo farita de la naviga kompanio Simao. S-ro Ye Changfu, ŝipestro de “Princino”, kiu laboris kiel ŝipano sur Lancang-rivero dekojn da jaroj, fiere diris: “Stiri grandan ŝipon kiel “Princino” estas la plej granda deziro dum mia vivo.” Jam ekde la komenco de la 50-aj jaroj li veturigis boaton sur la rivero. Tiam la boato estis tre simpla kaj veturigi ĝin bezonis forton. Poste li veturigis lignan motor-boaton por transporti grenon kaj salon. Bone konante la temperamenton de Lancang-rivero, li kelkfoje provveturigis sur Mekongo. Tamen estis la unua fojo por li stiri tiel grandan ŝipon al Louang Prabang de Laoso.

S-ro Zhang Zhaohua, asistanto de la ŝipestro, havas nur 25 jarojn, tamen veturigis trenŝipon jam 8 jarojn. Antaŭ unu jaro, gvidate de s-ro Ye, li kelkfoje veturigis ŝipon sur Mekongo. Menciante la navigacion, li ekscitiĝis: “Estas danĝere navigi sur Mekongo. Ĝia navigovojo estas primitiva sen navigaciaj sig-

naloj. Ni veturigis ŝipon, observante ondojn. Iam ni veturis eĉ sur torento kaj vorticoj tuttage”

Sub tiaj cirkonstancoj ĉiam povis okazi danĝeroj. Iumatene, kiam la ŝipo veturis sur la rivero inter Tajlando kaj Laoso, la dekstra flanko de la antaŭa kajuto subite trafis rifon, ke la ŝtalplato estis kelkloke vundita kaj multe da akvo kaj ŝlimo eniris en la ŝipon. Post 4-hora urĝa savado la ŝipo daŭrigis la vojaĝon. Ŝipestro Ye diris: “La hieraŭa navebla vojo povus fariĝi neirebla hodiaŭ. Oni devas unue plibonigi la fluejon de Mekongo, por ke ĝi estu taŭga por navigacio.”

Malfermi internacian navigacion de Lancang-Mekongo estas revo de pluraj generacioj. Maje de 1990 Ĉinio kaj Laoso unuafoje faris kunan esplordon de la riverparto inter Xishuangbanna kaj Louang Prabang. Laŭ ĉinaj navigovojaj normoj, en tiu

La arkado de la Ora Triangulo ĉe Mekongo





La pasaĝera ŝipo "Princino" antaŭ ekveturo

660-kilometra riverparto troviĝas 147 danĝeraj malprofundaĵoj, el kiuj 3 estas A-gradaj kaj plejparto estas C-grada. Post drago ĝi fariĝos la kvinagrada navigvojo, t.e. sur la rivero povos veturi 300-tonelaj ŝipoj dum 10 monatoj ĉiujare.

Februare de 1995 la esplorado de Mekongo en seka sezono kune farita de Ĉinio, Laoso, Birmo kaj Tajlando atingis sukceson. Tio multe helpis plibonigon de la naviglinio kaj akcelis subskribadon de interkonsento pri navigacio. Lei Chaorong, estro de la Trafika Buroo de Simao, diris, ke de post 1994 la haveno de Simao organizis 22 navigaciojn kaj transportis pli ol 2 500 tunojn da varoj. La avantaĝo de navigacio distingiĝas per mallonga distanco kaj malalta transporta kosto. Kvankam ankoraŭ ekzistas multaj malfaciloj, tamen la tago malfermi internacian navigacion en sudokcidenta Ĉinio ne estas malproksima.

Forlasinte la havenon de Simao, "Princino" vojaĝis suden kaj ellandiĝis ĉe la enfluejo de Nanl-rivero, kaj post unu kaj duona tagoj ĝi atingis la havenon de Chiang Saen de Tajlando, kie ni surbordiĝis. Malpli ol 10 km. norde de la haveno troviĝas la fama Ora Triangulo, kie estas limo de Birmo, Laoso kaj Tajlando, kun areo de 15-20 kvadrataj kilometroj. Nun Birmo kaj Laoso ankoraŭ ne agis turisme, sed Tajlando laŭeble ekspluatis la malgrandan landliman urbeton por altiri turistojn, utiligante la famon de la Ora Triangulo. La turisma enspezo de la urbeto atingas 4 milionojn da usonaj dolaroj ĉiunmonate. Metiartaĵoj, poŝtkartoj kaj T-formaj ĉemizoj kun desegno de papavaj floroj aŭ mapo de la Ora Triangulo sur standoj estas facile vendataj.

La Ora Triangulo famas ankaŭ pro sia produktado de opio. Ĝia plantado, prilaborado kaj vendado de papavo tre furiozis. En la pasintaj jaroj la registaro

de Tajlando severe malpermesis tion kaj instigis la vilaĝanojn kulturi grenon kaj fruktarbojn. Ekz. en iu urbeto nemalproksima de la Ora Triangulo teo jam fariĝis ĉefa ekonomia planto anstataŭ papavo. En la te-vendejo Yutian ni babilis kun ĝia mastrino Wang Huiyuan. En la 50-aj jaroj ŝia patro venis en tiun lokon, kiu siatempe estis tute izolita malgranda vilaĝo. Kun la disvolviĝo de turismo, la tervojo jam estis anstataŭigita per asfaltita vojo. Ŝi diris, ke oni grandaree plantis teon kaj starigis te-prilaborejon. La teo vendiĝas en Bankoko, Singapuro kaj Taiwan.

Poste "Princino" veturis al Houei Sai, havenurbo de Laoso, okcidente de Mekongo. En la pasintaj jaroj la landlima komerco inter Ĉinio kaj Tajlando plejofte okazis en Houei Sai, kie funkcias multaj oficejoj kaj vendejoj ĉinaj kaj tajlandaj. Navigacio kaj komerco vigligis la havenurbon. En najbaraj vilaĝoj ofte videblis japanaj aŭtoj transportitaj el Tajlando kaj multaj aliaj aŭtoj en la kajo.

Ĝoje ni konatiĝis kun la mastro de foto-studio, kiu devenis de Ĉinio. Lia familio vivis en Laoso jam tri generaciojn. Li naskiĝis en Laoso, tamen li ankoraŭ povis paroli ĉine, kio sentigis al ni grandan intemcon. Ni vizitis lian foto-studion kaj demandis lin pri lia vivo. Li esperis, ke frue venos la tago de eknavigado sur Mekongo.

Dum pli ol du monatoj ni vojaĝis tra Birmo, Laoso kaj Tajlando kaj fine atingis Louang Prabang. Ni veturis 1 600 km. ire-reire. Neforgeseblaj estas la ĉarmaj subtropikaj pejzaĝoj sur la bordoj de Lancang-Mekongo, la gustoplenaj hoteloj, palacoj kaj bambuaj domoj, la vojmontriloj kun diversaj lingvoj kaj la hejmosopiraj ĉindevenaj fremdlandanoj. Ni esperas veturi per "Princino" por reviziti ilin, post inaŭguro de la naviglinio de Lancang-Mekongo. ■

Kampano kaj lia aligatorejo

MULTAJ ĉinoj scias, ke aligatoro en Yangzi-rivero estas protektata animalo, same kiel pando. En Xuancheng de Anhui-provinco estas "Ĉina Reprodukta Centro de Aligatoro".

Tamen nur malmulte da homoj scias, ke en malgranda vilaĝo de Zhejiang-provinco, kiu distancas de Xuancheng 100 km. je la sama latitudo, estas "Aligatora Rezervejo" prizorgata de kampano.

Supozeble tiu ja estas la plej malgranda rezervejo en la mondo. La prizorganto kaj bredanto estas 25-jara kampano Ren Dabin.

I

La tagordo de Ren estas preskaŭ senŝanĝa: nutri aligatorojn, fari registradon, flegi arbojn ĉirkaŭ baseno kaj prizorgi aligatoridojn. Tion li komencis antaŭ 6 jaroj, en la aĝo de 19 jaroj.

Yinjiabian-vilaĝo, la hejmloko de Ren Dabin, situas sur Hangjiahu-ebenaĵo, en Changxing-gubernio. Tie estas reto da riveroj kaj densaj bambuaroj, kaj la vilaĝo interligiĝas rekte kun Yangzi-rivero per la rivereto Si'antang. En 1981, kiam koncernaj departementoj de Ĉinio faris enketadon pri la sovaĝaj aligatoroj, oni trovis, ke en Ĉinio vivas malpli ol 300 aligatoroj, ĉefe en kelkaj lokoj sur la limo inter la provincoj Zhejiang kaj Anhui, dum la vilaĝo Yinjiabian estas loko frekventata de aligatoroj.

En 1982 vilaĝanoj de Yinjiabian kaptis 11 aligatorojn. Kiam ili sciigis, ke aligatoro estas protektata de la leĝo, ili memvole starigis bredejon por la kaptitaj aligatoroj.

Poste la bredintoj jam ŝanĝiĝis

trifoje. La unua estis vilaĝestro. Post du jaroj li transdonis la laboron al iu maljuna kampano, kaj post 4 jaroj la maljunulo malfortiĝis kaj transdonis la laboron al la 19-jara Ren Dabin.

Ren Dabin estas timida junulo. Sed je mencio pri aligatoro, tute malaperis lia timideco. Li kondukis min al lia aligatora baseno. Ĝi areis 13 arojn kaj duono de ĝia akvosurfaco estas ombrita de salikoj kaj poploj. Ĉirkaŭ la baseno prosperas bambuoj.

Ren Dabin kirlis per mano en la akvo kaj ŝmace sonis per la voĉo. Ĉe tio tuj leviĝis brueto sur la akvo kaj dekkelke da aligatoroj aperis sur ĝi. Dabin montris ilin al mi: "Tiu ĉi estas Feifei, maskla. Tiu estas Erhei, 8-jara. Tiu estas Xiaocui, ilia reĝo..."

II

La aligatora rezervejo de Yinjiabian estas sankciita de la provinca registaro kaj subvenciata de la provinca forstuma administracio. Ĉiujare la rezervejo ricevas de la ŝtato dekmil juanojn, inkluzive de monata salajro de 130 juanoj por Ren Dabin.

"Kial la salajro estas tiel malalta?" mi demandis.

Kaj Ren faris por mi kalkulon: Aligatoroj ŝatas fiŝojn kaj litorinojn, ĉiutage ili konsumas 15 kg, kaj por tio sola li bezonas ĉiujare minimume dekmil juanojn. Krome li bezonas dragi la basenon ĉiujare kaj planti novajn bambuojn kaj arbojn. Tial lia salajro ne povas esti alta.

La plej grava afero en lia tagordo estas pretigo de necesaj fiŝoj por nutri la aligatorojn.

Je la kvara matene li jam devis

bicikli al foiroj en najbaraj vilaĝoj por trovi fiŝojn en malalta prezo. Iom post iom la fiŝvendistoj konatiĝis kun Ren kaj sciis, ke li aĉetis fiŝojn nur por nutri aligatorojn. Ili do ofte donacis al li malgrandajn fiŝojn. Ankaŭ liaj samvilaĝanoj, kiuj bredis fiŝojn, ofte donacis al li fiŝojn.

Laŭ la notoj en taglibro de Ren Dabin, mi faris kalkulon kaj sciis, ke en la pasintaj 6 jaroj la aligatoroj formangiĝis 9 400 kg. da fiŝoj. La cifero atestis la penemon kaj klopodadon de Ren Dabin.


Vintre de 1992, kiam mi unuafoje vizitis Ren Dabin en lia vilaĝo, mi vidis, ke en lia ligna dometo apud la aligatora baseno estis nur unu tablo kaj unu lito. Iu angulo de la dometo kun muroj penetreblaj de lumo estis kovrita de plasta membrano, tie ja estis ĉelo por aligatoridoj.

Aŭtune de 1994 mi triafoje vizitis lin kaj vidis, ke apud la baseno jam staras brika domo ekipita per kontraŭfrostaj kurtenoj kaj elektra radiatoro. En la domo estis aligatoridoj. Sed Ren Dabin mem ankoraŭ loĝis en la malnova ligna dometo. "Mi ne timas froston, mi estas pli eltenema ol aligatoroj", trankvile diris Ren Dabin.

III

Aligatoroj aspektas malbele kaj kruele. Sed Ren Dabin diris, ke fakte ili estas tre obeemaj. En somero, kiam la atmosfero estas sufoka, ili ŝatas sin sunumi sur akvo, aspekte kiel ŝtupo. Birdoj kaj aliaj malgrandaj animaloj povas sendangere ripozi sur ili.

Ren Dabin lernis en lernejo nur 7 jarojn. Li kutimiĝis al notado en taglibro pri nutrado kaj kovado de aligatoroj.



Aligaturo

En 1994 d-ro G. Wible, vicestro de la specialista grupo de aligaturo sub la Internacia Alianco de Protektado de Naturaj Riĉfontoj, vizitis la vilaĝon Yinjiabian. Li estis tre ĝoja, kiam li legis taglibrojn de Ren Dabin.

Li diris, ke sovaĝaj aligaturoj mem faru neston kaj kovu ovojn en bredejo, tio estas problemo longe studata de biologoj. Sed iu femala aligaturo de Ren mem faris neston kaj kovis 53 idojn en sinsekvaj 4 jaroj. La "natura kovado" de Ren Dabin povas pli multe konservi la genetikajn genojn de sovaĝa aligaturo, kompare kun arta kovado. Lia metodo havas specialan signifon por esplorado de la evoluado de aligaturoj, dum la taglibroj de Ren Dabin fariĝis unika materialo pri eksperimentado por solvi la problemon.

Usona kaj japana specialistoj pri aligaturoj loĝis unu semajnon en Yinjiabian. Ili trovis, ke la rezervejo de Yinjiabian havas simulan naturan ekomedion por aligaturoj, kaj Ren Dabin jam posedas originalajn teknikojn kaj metodojn de ekologia reproduktado de aligaturoj.

IV

Kiel speco de rara animalo, aligaturo estas nomata "viva fosilio".

En 1958 aligaturo kaj pando estis la unuaj difinitaj de la ŝtato kiel la unuaklasaj protektataj animaloj. En la pasintaj dek jaroj, "Aligatora Lago" de Ĉinio en Xuancheng jam reproduktis 4 000 aligaturojn. Kaj la dua, nome la rezervejo zorgata de kamparano, jam reproduktis 143 aligaturojn. La rara animalo aligaturo jam liberigis sin de la minaco de pereado.

En la fino de 1993 Ĉinio prezentis projekton "Porkomerca bredado de aligaturoj" al la Internacia Komerca Konvencio de Pereontaj Animaloj kaj Vegetaloj kaj oni aprobis ĝin. Laŭ la permeso la duageneraciaj idoj de bredata aligaturo povas esti vendataj. Aligaturo fariĝis la unua sovaĝa animalo de Ĉinio, kies porkomerca bredado estis permesata de internacia organizo.

En aprilo de 1994 Ren Dabin transportis 7 aligaturojn al la Akvario de Hangzhou (ĉefurbo de Zhejiang-prov.) kaj 10 aligaturojn al la Mil-insula Parko en la sama provinco. Kontraŭ tiuj aligaturoj

la rezervejo enspezis 30 mil jurojn. Tio ja estis la plej granda enspezo de la rezervejo en la pasintaj 12 jaroj.

Multaj komercistoj de Tajlando, Usono kaj eŭropaj landoj intencis aĉeti aligaturojn. Sole usona akvario planis aĉeti 1 000 aligaturojn.

Bredado de aligaturoj finfine alportis profiton. Iuj admiris la malproksimvidan Ren Dabin kaj aliaj opiniis, ke li fariĝis riĉulo.

Antaŭ nelonge mi kvarfoje vizitis la t.n. riĉiĝintan s-ron Ren.

Li restis entuziasma kaj honesta kamparano. Je la renkontiĝo kun mi, li senpacience tiris min al la baseno kaj diris al mi ĝojigan novaĵon: Li ĵus pesis la 20-jaran masklan aligaturojn, kiun li nomas Xiaocui, kaj informiĝis, ke tiu longas 178 cm. kaj pezas 39 kg. La ciferoj estis rekordaj en la materialoj.

Pri sia porkomerca bredado, Ren Dabin jam havas planon. Li diris, ke matura aligaturo ĉiujare demetas 20-30 ovojn, kaj ĉiuj ovoj estas elkoveblaj kondiĉe de atenta prizorgo. La idoj kreskas ĉiujare je dekelke da cm., kaj ili atingos unu metron post 4 jaroj kaj estos vendeblaj. Post 3 jaroj lia rezervejo povos liveri ĉiujare 100 aligaturojn. Kredeble, lia vilaĝo sen industria entreprenado havos belan perspektivon.

Parolante pri si mem, li diris al mi kun rideto: "Ŝajne mi estos bredisto dum la tuta vivo." ■

(Daŭrigo de p. 37)

dinastio iam ekskursis suden por inspektado kaj post lia foriro la cipreso tuj velkiĝis, dum la inspektado la imperiestro ĉiam sentis, ke la cipreso estis tuj apud li, sed post kiam la suvereno revenis en la palacon, la velkinta cipreso denove verdiĝis. La imperiestro opiniis, ke la arbo estas animita, kaj pro tio li nomis ĝin "animita cipreso"...

La kreinto de la vesto-parado estas 36-jara sinjoro Hu Xiaodan. Li estas teatra belartisto. Li faris la belajn vestojn kun la intenco montri la belecon de la konstruaĵoj. La klasikaj ĉinaj konstruoj estas sennombraj, sed s-ro Hu plej ŝatas la Malpermesitan Urbon, ĉar li opinias, ke la urbo, nekompareble impona kaj enhavoriĉa, plej bone manifestas la 5 000-jaran civilizacion de la ĉina nacio. Pro tio li dediĉis sian ener-

gion al kreado de tiu grandioza verko en la pluraj jaroj. Efektive estas multaj metodoj por montri la arkitekturan belecon, kiaj pentraĵoj kaj fotoj. Kial do s-ro Hu aparte preferas parodon de la vestoj? Laŭ liaj vortoj li volis, ke oni ĝuu la Malpermesitan Urbon kaj vestojn de iu alia flanko, tial la kvieta urbo ekmoviĝis, dum la vestoj kaj ornamaĵoj fariĝis portantoj de la kulturo de la urbo. ■

Masaĝo en la ĉiutaga vivo (VI)

A. KONTRAŬ KAPDOLORO

Kapdoloro povas esti kaŭzita de multaj faktoroj. Ne ĉiuj kapdoloroj, kaŭzitaj de endo- kaj ekstrakraniaj patologiaj ŝanĝiĝoj, estas kuraceblaj per masaĝo. Tamen, masaĝo povas rapide mildigi kapdoloron kaŭzitan de oftaj malsanoj, kiaj malvarmumo, hemikranio kaj hipertensio. Ĉi-sube ni konigos al vi iujn masaĝ-metodojn kontraŭ kapdoloro kaŭzita de tiuj malsanoj. Vi povos apliki la supre menciitajn metodojn por masaĝi la kapon kaj kolon. Koncerne la fojojn kaj tempon, vi devas fari laŭ la postuloj kaj ĉi tie ni ne plu traktos ilin.

Fundamentaj metodoj:

(1) La malsanulo kuŝu surdorse. Per la dikfingro prem-knedu la akupunkturajn punktojn *jintang* kaj post tio per la dikfingroj premu la akupunkturajn punktojn *zanĝu*, *jujaŭ* kaj tempiojn de la du flankoj de la kapo kaj knedu la tempiojn per la palpa flanko de la dikfingroj.

(2) Puŝu la du dikfingrojn ambaŭflanken de la meza linio de la harrando sur la frunto. Puŝu la dikfingrojn iom post iom malsupren ĝis la akupunktura punkto *jintang*.

(3) Imagu al vi kvin liniojn sur la frunto de la malsanulo. La unua linio estas de la akupunktura punkto *jintang* al *bajhuj*. La dua kaj tria linioj ambaŭflanke estas de *jujaŭ* al *bajhuj* kaj la kvara kaj kvina linioj de *sigukong* al *bajhuj*. Per la ungoj de viaj du dikfingroj pikite la kvin liniojn laŭvice.

(4) Per viaj du dikfingroj frota la frunton.

(5) Puŝu viajn du dikfingrojn sur la frunto, prem-knedu la tempiojn, la akupunkturajn punktojn

toŭuej kaj ambaŭ flankojn de la kapo.

(6) La malsanulo kuŝu surventre. Per la dekstra mano prem-knedu la nukon de la akupunktura punkto *fengĉi* al la malsupro de la nuko.

(7) Per la dikfingroj prem-knedu la akupunkturajn punktojn *fengfu*, *fengĉi* kaj *tjanĝu* po 10-20 sekundojn (Bildo 1).

(8) Per viaj kvin fingroj malforte kaptu la tutan verton de la malsanulo.

La supre menciitaj estas komune uzataj metodoj por kuraci kapdoloron kaj se vi volas kuraci kapdoloron kaŭzitan de jenaj malsanoj, vi devas fari aldone iujn masaĝojn:


KONTRAŬ KAPDOLORO KAŬZITA DE MALVARMUMO

(1) Metu vian mandorson sur iun korpoparton de la dorso de la masaĝato, turnu vian antaŭbrakon eksteren, etendu vian pojnjon ripetfoje, tiel ke estiĝas ritma knedado (Bildo 2). Premknedu la akupunkturajn punktojn *daĝuj*, *fejŝu* kaj *fengmen*. Kaptu la akupunkturajn punktojn *ĝjanĝing*.

(2) Puŝu tien kaj reen viajn manplatojn sur la dorso de la masaĝato laŭ la vezika meridiano, ĝis ĝi varmigos.


KONTRAŬ HEMIKRANIO

Forte prem-knedu la akupunkturajn punktojn *tjanĝu* kaj *fengĉi*. Premknedu 3-4 minutojn la korpoparton malantaŭ la oreloj laŭ direkto de granda okcipita nervo (Bildo 3).



Bildo 1

1. Fengĉi 2. Fengfu 3. Ĝjanĝing
4. Kolaj vertebroj 5. Torakaj vertebroj 6. Lumbaj vertebroj 7. Ŝenŝu
8. Mingmen 9. Vezika meridiano
10. Fejŝu 11. Fengmen 12. Daĝuj
13. Tjanĝu 14. Meza linio de la dorso




Bildo 2



Bildo 3

1. Granda okcipita nervo



Bildo 4

1. Ŭejĝang 2. Heĝang 3. Jingu
4. Ŭejĝong 5. Ŭejŝang 6. Patelo
7. Dubi 8. Ekstera flanko 9. Interna flanko 10. Ekstera flanko



Bildo 5

(Daŭrigo sur p. 50)

YI CHUAN:

Nova rimedo por kuraci encefalo- kaj kardio-vaskulan malsanon

LA freŝdata statistiko de la Monda San-Organizo montras, ke la nombro de tiuj, kiuj mortis de encefalo- kaj kardio-vaskula malsano, konsistigas 11.3% de la totala nombro de mortintoj en la mondo. Malfacile kuracebla, ĝi karakteriziĝas per granda morbokvanto, mortokvanto kaj kripligo. Multaj el la malsanuloj suferas de hemiplegio, afazio, perturbo de konscio kaj aliaj sekvaĵoj. Meze de la oka jardeko ankoraŭ ne troveblis efika rimedo kuraci la malsanon. Por kuraci ĝin oni aplikis en kliniko ekskluzive kinezoterapion kaj konservativan terapion. Sekve, preventi kaj kuraci la malsanon jam fariĝis grava problemo atentata de la tuta socio kaj precipe de la medicinistaro.

Por kuraci la malsanon, surbaze de la teorio de la tradicia ĉina medicino, kuracisto Zhao Buchang uzis samtempe ĉinajn herbodrogojn kaj akupunkturaron kaj rikoltis bonan efikon.

Geedzoj Zhao Buchang kaj ilia filo diplomiĝis el la Xi'an-a Medicina Universitato kaj okupiĝas pri kuracado de la malsano. Antaŭe Zhao Buchang multe maltrankvilis, ke li ne povis sukcese kuraci la suferoplenajn malsanulojn. De 1987 li, liaj edzino kaj filo konsultis multajn fakulojn kaj dokumentojn de la ĉina medicino, kolektis diversajn receptojn, observis pli ol 20 000 kazojn kaj elpensis kuracadon per akupunkturo kaj drogoj uzataj samtempe. Antaŭ ol kuraci, la kuracisto metas sur la kapon de malsanulo ĉapon kun 20 drogoj ene, premetante la ĉapon permane, masaĝas la akupunkturajn punkton *bajhuj* kaj aliajn punktojn verte de la malsanulo, rapide pikas akupunkturajn punktojn de liaj brakoj per pingloj kaj tiras, pikas kaj turnas la pinglojn 15-20 minutojn. La klinika praktiko pruvis, ke la kuracado donas bonan efikon. Preskaŭ ĉiuj hemiplegiuloj, suferantaj de akuta encefalo- kaj kardio-vaskula malsano, povas iri post 1-3-foja kuracado, sen ia ajn sekvaĵo. Plejparto de la suferantoj de hemiplegio kaŭzita de apopleksio estis brankarde portita en la Hospitalon de Encefalo-vaskula Malsano de Xianyang, en kiu Zhao Buchang laboras kiel estro, kaj elhospitaliĝis piedirante. La singapura maljunulino Liu Yamei, kiu paraliziĝis antaŭ ses jaroj, povis iri el la dormoĉambro en la salonon sen helpo de lambastono post 20-minuta kuracado far d-ro Zhao.



Zhao Buchang en kuracado

Tamen pro diversaj kaŭzoj multaj pacientoj ne povas veni al Xianyang por peti helpon de d-ro Zhao. Por sensuferigi ilin li komencis provfari novan medikamenton kontraŭ la malsano. Por precizigi la dozon li riskis gustumi skorpion kaj aliajn venenajn insektojn. Post ripetfoja eksperimento li sukcese elfaris la kapsulon Naoxintong utilan por vigligi sango-cirkuladon, solvi stagnaĵon kaj mildigi la sangomankon en la cerbo kaj koro. Kuracistoj en hospitaloj sub la Xi'an-a Medicina Universitato kaj aliaj organizaĵoj observis 300 kazojn kaj trovis, ke la kapsulo bone efikis sur 93.8% de la suferantoj de koronaria kormal-sano kaj sur 96% de la suferantoj de apopleksia sekvaĵo.

La kapsulo estis sankciita de la Ĉina Medicina Asocio. Ĝi estas grandkvante produktata kaj vendata ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en Eŭropo, sudorienta Azio, Japanio kaj Hongkongo. Multaj pacientoj resaniĝis post seancoj da kuracado. Ekzemple, antaŭ kvin jaroj onklino de ĉefdirektoro de industria kompanio de Usono paraliziĝis pro apopleksio. Post multfoja kuracado ŝi ankoraŭ ne resaniĝis. Du monatojn post kiam ŝi prenis la kapsulon, ŝi povis iri subtenate de aliaj. Kaj la kompanio fariĝis agentejo de la kapsulo en la Norda Ameriko.

La sukceso de Zhao Buchang en kuracado de encefalo- kaj kardio-vaskula malsano estas atentata de la internacia socio. La partoprenantoj de internaciaj simpozioj propraokule vidis, ke pacientoj el Francio, Germanio kaj Belgio povas iri sur planko, kuracite de Zhao kaj lia filo ĉeloke.

En la 42-a Monda Foiro de Novaj Inventoj, 1993, la kapsulo Naoxintong estis premiita per la ora medalo Eureka kaj kuracisto Zhao per Supera Ordeno de Oficiro donita de la reĝo de Belgio. En Ĉinio la kapsulo estis premiita per la ora medalo de la Ekspozicio pri Fruktoj de Ĉina Medikamento kaj Higieno.

Por diskonigi novajn medikamentojn kontraŭ encefalo- kaj kardio-vaskula malsano s-ro Zhao fondis la Buchang-an Farmacian Limigitan Kompanion en Xianyang. La kapsulo estas ĝia ĉefa produktaĵo.

Nun kuracisto Zhao plenenergie profundigas sian studadon pri encefalo- kaj kardio-vaskula malsano. Li deziras, ke miloj kaj miloj da suferantoj resaniĝu kiel eble plej frue. ■

POLITIKO



S-ro Jiang Zemin (maldekstre) gratulas s-ron Israel Epstein (meze) pro lia 80-jariĝo.

● La 20-an de aprilo Jiang Zemin kaj aliaj gvidantoj de la Ĉina Popola Respubliko adresis gratulon al s-ro Israel Epstein pro lia 80-jariĝo kaj 60-jara laboro en Ĉinio.

S-ro Epstein naskiĝis en Pollando kaj transloĝiĝis en Ĉinion kun siaj gepatroj en la infanaĝo. En la aĝo de 15 jaroj li ekfunkciis kiel raportisto.

Jam en la 30-aj jaroj s-ro Epstein aliĝis al la Ligo por Defendi Ĉinion fondita de Song Qingling, kiu estis honora prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko en la komenco de la 80-aj jaroj, kaj respondecis pri internacia propagando por gajni subtenon de diversaj landoj al la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio. Li intervjuis Mao Zedong en kavernodomo de Yan'an. Invitite de Song Qingling, li revenis de Usono al Ĉinio en la komenco de la 50-aj jaroj por fondi la revuon "Ĉinio en Konstruado" kune kun aliaj kaj fariĝis unu el la pioniroj de la propaganda afero de Ĉinio.

● Ĉinaj kaj japanaj junuloj rekonstruos la urbomuron de Nankino, Ĉinio, detruitan en la japana agresa milito kontraŭ Ĉinio, por ke la ĉinaj kaj japanaj junuloj, precipe la japanaj, kiuj malmulte scias pri la milito, ĝuste konu la historion.

La japana flanko proponis la riparadon de la urbomuro kiel parton de la aktivadoj memore al la 50-jara datreveno de la finiĝo de la Dua Mondmilito. Ĝi kuraĝigas la japanojn partopreni en tiuj aktivadoj kaj pretas gravuri sur la riparita urbomuro nomojn de monkontribuintoj, por ke oni memoru tiun neforgeseblan historion.

EKONOMIO

● Je la fino de marto estis sternitaj sume 2 354 km da unutraka normala linio de la Fervojo inter Pekino kaj Jiulong de Hongkong, t.e. 67.9% de la totala trakolongo de la normala linio.

● La dek grandaj investantoj por la ĉeftero de

Ĉinio en 1994 laŭvice estas jene: la regiono Hongkong kaj Aomen (20.2 miliardoj da usonaj dolaroj), Taiwan-provinco (3.29 miliardoj da usonaj dolaroj), Usono (2.49 miliardoj da usonaj dolaroj), Japanio (2.08 miliardoj da usonaj dolaroj), Singapuro (1.18 miliardoj da usonaj dolaroj), Koreio (720 milionoj da usonaj dolaroj), Britio (690 milionoj da usonaj dolaroj), Germanio (260 milionoj da usonaj dolaroj), Tajlando (230 milionoj da usonaj dolaroj) kaj Kanado (220 milionoj da usonaj dolaroj).

● Qingdao-haveno de Shandong-provinco, kiel la plej granda haveno por eksporti ĉinajn varmokonservujojn, okupis la unuan lokon tiuflanke en Ĉinio en la sinsekvaj 3 jaroj. La haveno funkciigas kontenerizitan dokon instalitan per pli ol 300 ŝtopilingoj por fridujoj kaj proponas bonkvalitajn servojn per landnivelaj teknikoj en riparo, renovigo, antaŭfridigo, antaŭkontrolado, konservo, remunto kaj tipoŝanĝo.

● La urbo Cangzhou ĉe Bohai-marbordo en norda Ĉinio aranĝis lastatempe komercan aktivadon en Pekino, kiu altiris al si komercistojn el pli ol 20 landoj kaj regionoj, kiaj Usono, Japanio, Koreio, Italio, Germanio, Singapuro kaj Hongkong, kaj tiujn el 26 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio. Dum la aktivado Cangzhou prezentis al la komercistoj ĉinaj kaj eksterlandaj pli ol 200 entreprenojn, inkl. de malpeza, kemia, elektra kaj tekstila industrioj, kaj tiuj de fundamentaj instalaĵoj, konstrumaterialoj kaj medikamentoj.

● Antaŭ 15 jaroj en la hejmoj de ordinaraj ĉinoj preskaŭ ne estis altklasaj elektraj aparatoj, sed nun ili videblas en ĉiuj familioj.

En 1994 Ĉinio produktis 7.64 milionojn da fridujoj, 10.96 milionojn da lavmaŝinoj, 3.82 milionojn da klimatiziloj kaj 77.30 milionojn da elektro-ventumiloj, kaj ĝi jam povas produkti certaskale elektrajn gladilojn, polvosuĉilojn, kuirpotojn kaj aliajn aparatojn, tiel ke Ĉinio enviciĝas inter la fortaj landoj de hejmaj elektraj aparatoj en la mondo.

● Lastajare rapide disvolviĝis la privataj industriaj kaj komercaj entreprenoj en Ĉinio. La nombro de familioj de privata entrepreno jam superis 20 milionojn. Ili plejparte okupiĝas pri komercado, kaj la ceteraj pri entreprenoj industria, manĝaĵa, serva kaj ripara.

ARKEOLOGIO

● Ĉinaj arkeologoj elfosis kaj riparigis en la fama porcelana urbo Jingdezhen de Jiangxi-provinco 118 porcelanaĵojn elbakitajn en la porimperiestraj bakujoj, ege valorajn en la regperiodoj de Hongwu kaj Yongle de Ming-dinastio (1368-1644). La porcelanaĵoj el la porimperiestraj bakujoj de Hongwu estas raraj, kaj en la Muzeo de la Imperiestra Palaco en Taibei, kie konserviĝas plej multe da porcelanaĵoj el la porimperiestraj bakujoj de Qing-dinastio, estas nur sep tiaj porcelanaĵoj. Ĉi-foje estis elterigitaj pli ol 40 bludeseĝnataj kaj ruĝaj porcelanaĵoj kun emajlita reverso de Ming-dinastio. La nombro egalas al tiu konservata en ĉiuj grandaj muzeoj de la mondo.

La elterigitaj porcelanaĵoj de Hongwu konstatas, ke jam en 1369, la dua jaro de Hongwu-regado, konstruiĝis porimperiestraj bakujoj en Jingdezhen. Kaj la elterigitaj bludeseĝnaj porcelanaĵoj de Yongle estas samaj kiel la porcelanaĵoj konservataj en la muzeoj de Irano kaj Turkio. Tio pruvis, ke siatempo tiaj porcelanaĵoj estis produktitaj por eksportado.

La plej granda ĉina purpur-argila kruĉo kun alteco de 110 cm kaj diametro de 60 cm povas enteni 300 kg da akvo.



● En sia esplorado sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo ĉinaj sciencistoj trovis grandan kvanton da ŝtonaj produktoj kaj pecon da ceramikaĵo ĉe Yakou de Kunlun-montaro 3 800 m super la marnivelo. En la leŭsa stratumo 4 000 m super la marnivelo ili trovis du cindrotavolojn, kiuj evidente estis hejto-ruino de antikvuloj. Ili trovis ankaŭ fosiliajn dentojn kaj ostojn de bovo kaj hundo en tertavolo paralele al la cindrotavoloj.

Laŭ la laboratoria analizo, la antikva vojo, sur kiu nun etendiĝas la Qinghai-Tibeta Ŝoseo, servis kiel grava pasejo inter la landinterno kaj Tibeto de Ĉinio jam antaŭ 20 000 jaroj.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Mikromotora, videbla nur per mikroskopo, naskiĝis lastatempe en la Metalurgia Instituto de Ŝanhajo sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Kun diametro de 100 mikrometroj, rapido de 0.001-20 rotacioj minute kaj minimuma tensio de 20 voltoj, ĝi atingis la monde avangardan nivelon en ĉiuj teknikaj normoj.

● La Flava Rivero estas rivero kun plej multe da sablo en la mondo. En la pasinteco Sanmenxia-akvokonservejo de Henan-provinco entenis po 37.6 kg da sablo en ĉiu kubmetro da akvo, kaj krome, 60% de la akvokvanto kaj 85% de la sablokvanto ellasiĝis inter junio kaj oktobro. Eroziite de la sabloakvo, la padeloj kaj radoj de la kvin hidraŭlikaj turbinoj, muntitaj en la elektrejo Sanmenxia en la 70-aj jaroj, estis serioze detruitaj.

En 1989 la administrejo de la Akvoutiliga Pivoto de Sanmenxia kaj aliaj dek scienc-esploraj organizoj kune komencis esploron pri elektroproduktado per sablo-

akvo kaj lastatempe solvis tiun problemon. La esplorado montris, ke la generatoraro de la elektrejo Sanmenxia, kiu estis en provado, produktis en ĉ. ses jaroj elektron de 210 milionoj da kWh, kun rimarkinda profito.

TURISMO

● La akvopuriga projekto ĉe la 1 390-jara Zhaozhou-ponto estis finita post unujara penado. Ĝi ne nur purigis la akvon de la rivero, sed ankaŭ largiĝis kaj profundigis la rivervojon, tiel ke la ŝtonponto retrovisian originan formon kun la ĉefa spano de 37.02 m.

Zhaozhou-ponto, alinome Anji-ponto, kuŝas en Zhaoxian-gubernio de Hebei-provinco. Ĝi estas la unuarka ŝtonponto, plej frue konstruita kaj plej bone konservata en la mondo.

KULTURO

● Projektado de la skulptaĵaro de la arta kamparilo sur la placo de la Atlantaj Olimpikoj en 1996 estas adjudikita de la ĉina artisto Han Meilin.

Laŭ projektado la totemo drako en la tradicia bronza kulturo de Ĉinio vidiĝas en originala plastiko. La kampanilo altas ok m kaj ĝia korpo estas masonita el granito. Sur ĝia supro estas bronza drako kun levita kapo kaj sur ĝia bazo — kvar vivoplenaj drakoj. La skulptaĵaro konigas la tempan kaj spacan ŝanĝiĝon en la pasinteco, estanteco kaj estonteco.

SOCIO

● Niu Maosheng, ministro de la ĉina Akvoutiliga Ministerio, diris lastatempe, ke akvomanko serioze minacas Ĉinion.

Unue, Ĉinio, kun pokapa kvanto de akvofonto egala al malpli ol kvarono de tiu de la mondo, okupas la 88-an lokon tiufanke en la mondo; due, manko de akvofonto ĉiam pli serioziĝas, precipe en norda Ĉinio kaj ĉemaraj urboj, kaj malhelpas la disvolviĝon de la loka socia ekonomio; trie, la akva poluado ĉiam pli graviĝas; kvare, la riveraj kaj urbaj kontraŭinundaj normoj ĝenerale malaltiĝas kaj river-inundoj ankoraŭ minacas Ĉinion; kaj kvine, senbrida eltirado de la subtera akvo kaŭzas serion da ekologiaj problemoj, kiaj sekeco, sinko de tersurfaco kaj invado de marakvo.

● “Projekto de Feliĉo” starigita por helpi la malriĉajn patrinojn disvolviĝos en Ĉinio.

La ĉefa iniciatinto de la projekto estas la Loĝantara Bonstatiga Fonduso de Ĉinio. Ĝi faros tri aferojn por la malriĉaj patrinoj: doni al ili seninteresan krediton aŭ funkciigi ekonomian entreprenon por disvolvi familian ekonomion kaj doni laborŝancon; monhelpi subdistriktajn lernejojn de patrinoj por liveri al ili lernokondiĉojn; doni al la akuŝintinoj san-protektan servon kaj kuraci al ili virinajn malsanojn.

KORESPONDI DEZIRAS

*Kuracejo Espero dez. kor. kun e-istoj t.m. cele interŝanĝi informojn pri tradiciaj medicinoj, natura terapio, orienta medicino, akupunkturo, mokso, masaĝo, fari ĉin-medicinan kuracon kaj sanprotektadon. La kuracejo ankaŭ interesiĝas pri turismo, muzika kaj arta aferoj kaj internacia komercado. Adr.: S-ro Tu Jianyi, Kuracejo Espero, P.O. Kesto 87, CN-610011 Chengdu, Sichuan, Ĉinio. Tel.: 00-86-28-6749429.

*Risto DIMOSKI dez. kor. kun blinda e-isto per brajla alfabeto. Adreso: str. Dima Narednikot, Penzionerska Zgrada 3/1, 97500 Prilep, Makedonio.

*Huang Yinbao, 33-j. dez. kor.

kun e-istoj pri agra, horta, biologia aŭ rilataj sciencoj kaj respondos kun belaj poŝtmarkoj. Adreso: Jingchuan-xian Kewei Nongkesuo, CN-744300 Jingchuan, Gansu, Ĉinio.

*Se vi deziras, ke ni arangu ekspoziciojn ankaŭ pri via lando, bv. sendi ilustraĵojn, turismajn perspektivojn k.a. al: Esperanto, PK 61, 5180 Polski Trambeŝ, Bulgario. Korespondpetoj estos ankaŭ akceptataj.

*E-istoj el Norvegio dez. interŝanĝi pm. kun E-geamikoj el diversaj landoj. Ankaŭ ŝatas korespondi pri ĉiaj temoj. Adr.: Vašek Šestak, Iglamyr 6, N-5500 Hangesund, Norvegio.

(Daŭrigo de p. 46)

KONTRAŬ KAPDOLORO KAŬZITA DE HIPERTENSIO

(1) Puŝu viajn dikfingrojn laŭ la meza linio de la dorso de la masaĝato de la akupunktura punkto *fengfu* al *daĝuj*. Puŝu ilin laŭ la vezika meridiano ambaŭflanke de la nukaj vertebroj. Faru tion 3-4 minutojn.

(2) Prem-knedu la akupunkturajn punktojn *gĉuanjĉuan*, *ĉjihaj*, *ŝengjĉue*, *ĝongĉuan*, *ŝenŝu*, *mingmen* kaj *jongĉjĉuan*.

B. KONTRAŬ GENUA OSTA ARTRITO

La malsano ofte kaŭzas doloron kaj ŝveliĝon al la genuaj artikoj kaj tre malhelpas la moviĝon de la artikoj. La nomita malsano ofte okazas ĉe mezaĝuloj kaj maljunuloj.

La masaĝato kuŝu surdorse kaj vi staru apud li.

(1) Kaptu la antaŭan parton de la genuoj, de supre malsupren. Faru tion ripetfoje ĝis la genuoj varmiĝos.

(2) Per la ungoj de viaj dikfingroj piku la korpoparton ĉirkaŭ la pateloj (Bildo 4) kaj knedu la lokon, en kiu la masaĝato sentas doloron.

(3) Metu vian mankavon sur la patelon. Movu vian manplaton sur la patelo supren kaj malsupren, dekstren kaj maldekstren, livume kaj dekstrume. Tiaokaze la malsanuloj plejparte sentas doloron, tial via premforto devas esti modera, por ke la masaĝato povu elteni tion.

(4) Prem-knedu la genuan liganmenton per viaj fingroj.

(5) Prem-knedu la akupunkturajn punktojn *dubi*.

(6) Prem-knedu la ligojn interne kaj ekstere de la genuoj.

(7) La masaĝato fleksu siajn genuojn. Per unu mano tenu la maleolon kaj per la alia tenu ties genuon, etendu kaj fleksu la genuojn, turnu ilin internen kaj eksteren (Bildo 5).

(8) La masaĝato kus/u sur ventre. Kaptu la malantaŭan parton de la genuoj kaj tuj forlasu ĝin. Faru tion de supre malsupren ripetfoje.

(9) Prem-knedu la akupunkturajn punktojn *ĉejŝang*, *ĉejĝong*, *hejang*, *jingu* kaj *ĉejjang*. Per la fingroj premu la tendenojn ambaŭflanke de la akupunktura punkto *ĉejĝong*.

(10) Forte rulu vian pugnon sur la malantaŭa parto de la genuoj kaj iliaj supraĵoj kaj malsupraĵoj.

(11) Fleksu kaj etendu la genuojn, turnu kaj malstreĉu ilin. ■


GALERIO


“Fruktobranĉo kaj Birdeto”

Teksto de WU BO

La delikatlinia pentraĵo “Fruktobranĉo kaj Birdeto” estis farita sur silko en formato de 26.9 cm x 27.2 cm. Ĝi estis majstraĵo de pentristo Lin Chun de la Pentrarta Akademio de la Suda Songdinastio (1127-1279).

En la pentraĵo estas branĉo kun maturaj fruktoj altirantaj birdojn. La koloroj estas delikataj kaj naturaj kaj la formo de la objektoj estas preciza kaj vivoplena. La ruĝetaj fruktoj, la okre verdaj folioj, la ekflugonta birdeto... ĉiuj estis versimile bildigitaj. Kaj oni eĉ povas vidi la velkintajn partojn de la folioj kaj la postsignojn de vermomordado sur la fruktoj. La pentraĵo montris la altan teknikon de la aŭtoro, kiu estis aparte lerta en pentrado de vegetalo, birdo, insekto, frukto k.a. La pentraĵo estas lia ĉefverko.





Jiayuguan-pasejo, la okcidenta fino de la Granda Muro

Foto de DA WEI

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九五年第八期

(本刊代号:二——九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2